


POR RADIO...   2a Jaro
PER ESPERANTO...   3a Kvaronjaro 1957   N°6

Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur

# LA LIBERPENSULO

LUMIGAS NIAN VOJON...

•Ĉiutrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado.•
•Parolilo de ĉiuj Liberpensuloj Esperantistoj.•

Redakcio: G A Y Andreo, Rue Lambert-Dumesnil · H E R B L A Y (S.et O.)
FRANCIO

Abonprezo: 100 FFr por 10 numeroj. C.C.P. PARIS 105-49-49

## KELKAJ MINUTOJ KUN MAJSTRO

Mi jam prezentis al la legantoj de"La Liberpensulo" eltiraĵojn el la verkoj de Han Riner. Hodiaŭ ankoraŭ mi ĉerpas el la verkaro de tiu lasta, pli precize el diskuta prelego inter Han Riner (H.R.) kaj la pastro Viollet (V.). Kio sekvas estas eltiraĵo de la broŝuro "Ĉu Dio Ekzistas?",kiun mi esperantigis por vi. -A.G.-

H.R.- Iu Dio, kiu estus volinta aŭ permesinta ĉiun el la krimoj el ĉiu el la tagoj de la mondo; iu Dio, kiu estus krimulo tiel multe, plejmulto el la modernaj apologistoj ne kuraĝas lin defendi en ĉiu el liaj agoj. Ili plivolas diri, ke li agas per generalaj voloj. Mi ne vidas tion, kion povas gajni al tiu ŝanĝo de sistemo la fantomo, kiun mi akuzas.

V.- Mi ankaŭ ne; mi samopinias kiel vi.

H.R.- Ke li peku apartajn krimojn aŭ unikan krimon, kiun la perado de la naturaj leĝoj dividas en multegaj krimoj...

V.- Estas same.

H.R.- La rezultato, kiel konfesas S-ro la pastro Viollet, estas la sama. Kiel, fakte, defendi iun ĉiopovan, kiu estus kreinta la mondon tiamaniere, ke ĉiuj kreitaĵoj de lia amo estus destinitaj suferi, morti en doloro, kaj kiu, samtempe, estus doninta al ili delikategajn povojn de sufero, kaj teruro de la morto ?

Ĉu vi kredas al la Maltusa leĝo ? Mi ne kuraĝas aserti, ke la speco plimultiĝas ekzakte laŭ la granvalora geometria pligrandiĝo kaj la nutraĵoj ekzakte laŭ la kompatinda aritmetika pligrandiĝo. Sed, maldetale estas certe, ke iu ajn speco celas multiĝi multe pli rapide, ol la nutraĵoj al ĝi destinitaj de la neerarema Providenco. Ĉu estas intenco, ĉu estas saĝo, ĉu estas amo en tiu troa abundeco da buŝoj por nutri, kaj tiu malabsoluta neproduktemeco da nutraĵo ?

Sed mi estas perpleksa kaj senkuraĝigita akuzanto de la tro multaj indignindaĵoj de la akuzato.

Mi revenas al la katolika Dio, kaj rimarkas, ke samtempe kiam li portas apartajn krimojn, la bibliajn krimojn ekzemple,(tiuj-ĉi vi ne povas ilin nei ; vi ne povas diri, ke estas la pastroj kiuj forpelis al Saŭl, kiuj malsimpatiegis kontraŭ Esaŭ antaŭ lia naskiĝo, kiuj petis al Abraham mortigi al Isaak), tiu Dio estas samtempe karikatura difino de la senlimo. Li al ni, ŝajnas, fari rivelojn pri li, kaj la granda rivelo, (vidu kiom ĝi devas klarigi niajn intelektojn kaj tuŝi niajn korojn !) tio estas, ke li estas unu kaj tri samtempe. Se mi parolus antaŭ filozofia publiko, mi penus montri, ke la nombro kaj la senlimo estas neakordigeblaj aĵoj.

V.- Brave ! Mi dirus la samon.

H.R.- Sed ke unu egalu tri, ke la Dio estu en tri personoj, ke ĉiu persono estu Dio kaj ke tamen ili konsistigu unu nura Dio, estas tie vortoj kolektitaj por nenion diri; vortoj, kies la duaj neniigas la unuajn. Ne estas tie la eldiro de juĝokapablo, estas la forigo de ĉiu juĝokapablo. Kaj, se mi ne konsentas ripeti tiujn parolojn, al kiuj estas al mi neeble doni sencon, mi estos kondamnata al infero dum ĉiameco.

V.- Ne.

H.R.- Mi estas devigata vin kontraŭdiri. Vi volus min savi; vi tion ne povas; vi nur povas perei kun mi. (oni ridas).

V.- Io min mirigas en via rezono. Vi okupas vian tempon, por konstrui iun Dion laù via maniero kaj diri: "Jen Dio". Nu, nia religia difino de Dio, tio estas ke se ni provas ĉiutage lin malkovri, li estas senlime supre ĉiuj niaj konceptadoj. Sekve estas li, kiu vin juĝos kaj estas tute ne la Eklezio, eĉ ne la Papo. Estas Dio, ne estas aliulo. Estas li kiu vidos, kiuj estas viaj respondecoj.

H.R.- Miaj respondecoj, la Vatikana Konsiliĝo ilin konsideras kiel multe pli gravaj kaj pli certaj, ol vi, S-ro la pastro Viollet. La Vatikana Konsiliĝo akceptas, ke oni povu esti savata en ekstrema okazo; kiam oni estas de alia religio ne konante la katolikan religion; sed kiam oni estas havinta la kredon per la lecionoj de la Eklezio (tio okazis al mi) kaj kiam pri ĝi oni rezignis (tio ankoraù okazis al mi) oni estas perdita sen pardono. Vi povas trovi al mi neniun pravigon; nenio permesas forlasi la kredon, kiam oni ĝin estas havinta.

V.- Estas tute simple. Se vi perdis la kredon sekve de la pekoj de via konscienco, vi prirespondas. Se vi ĝin perdis sekve de la malbonaj klarigoj kiujn vi aùdis, vi ne prirespondas kaj estas tiuj, kiuj al vi donis malbonajn klarigojn, kiuj prirespondas.

H.R.- Estas ankoraù pli simple, ol vi diras.

Mi perdis la kredon tial, ke mia koro, mia konscienco kaj mia racio min devigis foriĝi de la dogmoj, kiujn al mi oni instruis dum mia infanaĝo.

Nu, la Vatikana Konsiliĝo, Konstitucio DEI FILIUS, Ĉapitro 3a., DE LA KREDO, diras:"la kondiĉo de tiuj,kiuj aliĝis al la katolika vero per la dia donaco de la kredo estas tute ne la sama, ol tiu de tiuj, kiuj kondukitaj de la homaj opinioj, sekvas falsan religion; ĉar tiuj, kiuj elektis la kredon sub la instruo de la Eklezio neniam povas havi neniun pravan motivon ĝin forlasi, kaj nuligi en dubo tiun kredon."

Miaj kialoj por forlasi kaj por nuligi en dubo tiun kredon estas, mi tion ripetas, kialoj de konscienco, kialoj de koro kaj racio, kiujn la Vatikana Konsiliĝo malakceptas. Ĝi min kondamnas al infero, kaj se vi ne kondamnas min al infero, ĝi vin kondamnas al infero kun mi. (Oni ridas).


-----*******-----

# DU SONĜOJ!

(Originala Poemo de J. Burger).

Pastro mokis instruiston:
"Strangan sonĝon havis mi!
En ĉielo mi troviĝis,
Sed disputo eĉ kun kri'
Bruis, kie pendis ŝildo:
"Jen la Instruist-ĉiel'!"
Pensis mi; "eĉ post la morto
Ili emas al ribel'!"
Postan tagon al la pastro
Diris nia Instruist':
"Ankaù mi en sonĝo estis
Tie ĉe Jezuo Krist'!
Ankaù mi ekvidis ŝildon:
"Jen ĉielo por Pastrar'!"
Sed ne aùdis mi disputon
Inter fratoj de l'altar',
Regis paco, plensilento,
Rara pastra harmoni'...
Sed ne fidis mi; la pacon,
Scivolema estis mi
Pri konduto de la pastroj
Post la morto en ĉiel'.
Kaŝmalfermis mi la pordon,
Cio kuŝis en malhel',
Ne ĉeestis iu pastro,
Eĉ neniu diakon'
Estis tute ja malplena
La "Pastrar-ĉiel-salon'!"
J.B.

***********************



## NI RIDU IOM!

Johano estas dekjara knabo, kies fratino deknaùjara estas belega fraùlino. La knabo ĉeestas la kateĥismon, ĉar la familio estas pia.

La pastro, juna kaj turmentita de la deviga fraùleco, amindumas la fratinon de Johano.

Iutage, post la kateĥismo, la pastro diris al Johano: "Petu vian fratinon, ke ŝi venu je la oka vespere ĉe la ĉerizarbo de la pastrejo, ĉar mi havas ion por diri al ŝi.Jen dek frankojn por via komisio."

Johano faris la komision, sed intrigita kaj dezirante scii, kion la pastro diros al lia fratino, sin kaŝis en la ĉerizarbo. Jen kion li aùdis:

- Jen vi fine venis, belega fraùlino. Ĉu vi scias, ke mi vin amas ?

- Jes! Ankaù mi vin amas, sed... kial vi fariĝis pastro?

- Tio ne malhelpas, karulino, ni estu geamantoj...(kaj samtempe la pastro estis iom tro amindume maltimema).

- Ne, ne tion faru, estu prudenta. Pripensu, se mi havus infanon...

- Ne timu, karulino. Tiaokaze tiu, kiu estas ĉi-supre, pri la infaneto zorgos. Tiam aùdiĝis kraketo de branĉo , kaj Johano malsuprenirante, diris:

- Ne, tute ne ! Ne kalkulu kun mia zorgo tiaokaze. Por nur dek frankoj mi ne tion faros...

(Anekdoto esperantigita de X...)

* * *

Gepatroj petis sian filineton konduki kaprinon al virkapro.

Sur la vojo, tirante la kaprinon per ŝnuro, la knabino renkontas sinjoron la pastro, promenanta.

-Bonan tagon ! Suzi, kien vi iras kun via kaprino ?

-....Mi kondukas ĝin al virkapro...

-Ha!...sed ĉu via patro ne estus povinta plenumi tiun laboron ?

-"Ne sinjoro...devas esti la virkapro",respondis la knabino.

(Esperantigita de B.H.)

Andreo LORULOT.-



# K I A L M I E S T A S A T E I S T O !

(Vidu la komencon de tiu traduko sur la n° 3a.)

Estus vane do, karaj legantoj, se vi maltrankviligus vian cerbon: Vi komprenos nenion pri tio, neniam !

La pastro Mikaelo spertas la bezonon, fari klarigan rimarkon: "Sume, tio min ne miras, li skribas iom poste. Pli niaj misteroj estas nekompreneblaj, pli ili estas indaj de la Dio, kiun al mi rivelas mia racio, kaj do, pli ili estas kredindaj. Ĉu iu xxx vereco,kiun mi komprenus, entenus la senlimon ?" Estas en tiu senco, ke estas vere diri,kun Tertulien (Tertullien): "Malpli mi komprenas, pli facile mi kredas, kiam temas pri Dio !" (I)

INTELEKTA SCIVOLO KAJ KREDO.-

S-ro Alberto Delakur (Delacour) skribis antaŭnelonge: "Por neniigi la religian senton, estus necese du okazoj, kiuj estas same neeblaj: ĉu amputi la homan naturon de tiu nemorta scivolo, kiu faras lian turmenton kaj lian gloron; ĉu elpruvi la neekzistadon de Dio, entrepreno absolute sensenca,ĉar ĉiu nea elpruvo estas neebla al la homa racio. Do, la serena nereligio estos ĉiam escepta, kaj ofte sendaŭra stato. T.K.N.E." (Tio,kion necesis elpruvi.-Noto de la trad.)

Al mi tute ne plaĉas tiun T.K.N.E.

Ĝi estas plena je malhumila memfido, kiu vere plaĉas.

T.K.N.E. ! Estas decidite ! Estas antaŭkalkulite !

T.K.N.E. ! Vi silentu ! Ne protestu, aŭ mi vin enkarcerigas !

Mi humile petas al S-ro Delakur, ke al mi li pardonu, sed mi ne estas konvinkita.

Mi opinias ke tiu, kiu neas Dion, tute ne estas devigata AMPUTI LA HOMAN NATURON DE TIU NEMORTA SCIVOLO, KIU FARAS ĜIAN TURMENTON KAJ ĜIAN GLORON...

La ateismo neniun amputas.

Tio, kio stumpigas la homan komprenpovon, tio estas la blinda kredo, la aŭtoritato - tio ne estas, tio ne povas esti la Libera Penso.

Ĉu S-ro Delakur vere kredas, ke la kredanto pli scivolas la veron, pli avidas la lumon,pli soifas scii,ol la nekredanto,ol la ateisto ?

Estas tute male, mia bona sinjoro !

La kredanto ne serĉas; li neniam bezonis serĉi, ĉar li trovis la veron tute farita(mi estis skribonta tute maĉita), en lia kateĥismo.

Kiun scivolemo povus senti obeema civitano,irante en la vivo kun okulŝirmiloj solide fiksitaj ambaŭflanke de la vizaĝo - portante la Revelacion sub la brako !

Oni al li instruis... silenti, ne fari demandojn.

La scivolo,tio estas malsana kaj danĝera aĵo, S-ro Delakur! Tio certe devenas de la diablo ...

Ĉiaokaze, tio estas frukto de la homa malhumileco,kiu volas ĉion scii, kaj ĉion kompreni,anstataŭ kurbigi la frunton humile, kaj senbrue viveti en la nescio.

Ĉu Adamo ne estis frapita (kaj kiel!) ĉar li gustumis la frukton de la arbo pri Bona kaj Malbona Sxxxx Scienco ?

Li do estis instigata de la Scivolo - kaj de Evo,ankoraŭ pli scivolema, ol li.

La intelekta scivolo, la sopiro al la granda Kialo de la vivo kaj de la mondo, ne estas la monopolo de la religia spirito. Estas eĉ la malo, kiu estas la vero.

Jen jam unu punkto,pri kiu la T.K.N.E. al mi aspektas iom...trorapida.

---

(I) Apologiaj priparoladoj, I06.- Estas la famekonata CREDO QUIA ABSURDUM : MI KREDAS ĜIN, ĈAR ĜI ESTAS ABSURDA !!

"PRUVI, KE DIO NE EKZISTAS".-

La teksto de S-ro Delakur (Albertà) entenas alian aserton, ankoraù pli ĝojiga.

ESTAS ABSOLUTE SENSENCA, li diras, voli elpruvi la neekzistadon de Dio.

S-ro Delakur ne elpensis tiun "ekzamenan kaptilon".

Kiom da kontraùparolantoj, en publikaj kunvenoj, ĝin al mi elparolis, triumfe :

"NI NE POVAS PRUVI, KE DIO EKZISTAS, KONSENTITE. SED VI NE POVAS PLI PRUVI, KE LI NE EKZISTAS !!"

Mi kutimas respondi al tiuj kontraùparolantoj :

Via konfeso estas al mi tre agrabla. Vi rekonas esti malkapablaj, pruvi vian Dion.

Tiam, kial vi parolas pri li ? Kial vi amegas lin ? Kial vi preĝas lin?

Vi faras el li la pivoton de via vivo, la superegan celon de via tuta agemo - kaj vi konfesas, ke vi ne povas pruvi al mi la ekzistadon de Dio, kaj vi volus min vidi kunlabori al la kulto, kiun vi al li produktas...

Tio ne estas serioza.

Mi bone komprenas, ke vi provas al mi vigle rebati :

"Pruvu al mi, ke Dio ne ekzistas !"

Pardonu ! Tiu, kiu asertas la ekziston de io, tiu devas elpruvi tiun ekziston.

Se li ne kapablas tion fari, komprenite. Ĉiu alia elpruvo estas superflua. Vi mem vin kondamnis.

Estas cetere iu elpruvo, kiun mi povas facile fari. Tio estas, ke ĈIO OKAZAS en la universo tiel, kiel se neniu Diaĵo ekzistus. Ni tion vidos pli poste.

Ne povante pruvi ilian Dion, la kredantoj argumentas por elpruvi, ke oni ne povas malbezoni kredi al Li !

Estas tiuj argumentoj, kiujn mi diligentos kontraùargumenti, en la nuna verko.

LA SOPIRO AL DIO .-

Oni diris iun vesperon en la ĉeesto de Renan : "Ĉu Dio ekzistas ? - Ne, ankoraù", li respondis.

"La homo estas sopiro al Dio", diris Sanktulo Aùgusto.

La frazo estas bela, sed ĝi estas neekzakta.

La homo estas sopiro al Beleco, al Boneco, al la Lumo.

Tio estas al Feliĉeco, al la disvolvo kiel eble plej kompleta.

Tio estas al la Vivo...

Ŝati la Vivon, la Vivon ĉiam pli nobla, pli utila, pli konscia, la Universan Vivon; estas la nura Idealo inda je tiu nomo.

Ĉu oni riskos kvazaùdiri, ke tiu Idealo estas malsupera al tiu de la religio ? Ke ĝi estas malkapabla plibonigi la homon ?

Sed, funde de ĉiu religio, ĉu ni ne trovas analogian sopiron, pli malpreciza kaj pli malklara, aù pli malproksima, sed ekvivalenta?

La nura malsameco - kaj ĝi estas grava - tio estas, ke la religioj lokumas la efektivigon de ilia Idealo en alia mondo, ekstere de la homaro...

La plej nobla el la homaj sentoj estas tiel malĝustigita, detenita de ĝia normala kaj harmonia celo.

El sopiro al plibonigo en la ĝojo... oni faris konsternegitan submeton, malpligrandigon de la Estulo, moktrompon !


Daùrigota.

L'Imprimeur-gérant: GAY André. Imprimerie spéciale de "LA LIBERPENSULO" rue Lambert Dumesnil -HERBLAY- (S.& O.) FRANCE.

2a jaro
2a kvaronjaro 1957

Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur

N° 5




P O R  R A D I O . . .
P E R  E S P E R A N T O . . .

# LA LIBERPENSULO

L U M I G A S  N I A N  V O J O N . . .

(Ĉiutrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado *** Parolilo de ĉiuj Liberpensulaj Esperantistoj ***
Redakcio: G A Y Andreo, Rue Lambert-Dumesnil H E R B L A Y (S.& O.) FRANCIO
Abonprezo: 100 Fr.Fr. por 10 numeroj.
C.C.P. PARIS 10549-49)

## BILANCO

Post la dissendado de niaj kvar unuaj numeroj, ni faru sinceran bilancon de nia agado.

Nia propagando komencis per eldono de presita propagandilo, dum la jaro 1954. Ni havis tiutempe multajn iluziojn. La rezultato estis eldono de nia propagandilo 1.000 ekzemplere, kies nur proksimume 400 estis disvenditaj, aŭ disdonitaj. Tio tamen montris al ni, ke ne eblis aperigi presitan bultenon nune. Do, ni kontaktis multajn kamaradojn, kaj aperis je la fino de 1955a jaro multobligita bulteno kvarpaĝa, kies n°1-a ni eldonis 300 ekzempleroj. La n°2-a estis ses paĝa, ankaŭ la 3-a, tiu lasta sur pli bela papero kaj kun presita titolo. La 4-a ne aperis siatempe pro malfacilaĵoj travivitaj de nia kunlaboranto G.FALGIER. Tiu n°4-a aperis dum majo 1957.

Jen la rezultato de nia aktiveco ĝis nun: ABONANTOJ: a) en Francio:......22
b) alilande:........12

al kiuj aldoniĝas grupaj sendoj al : WEICHMANN (Germanio)....40
BLOMBERG (Svedio).......10
GIBAUX (Francio).....10
MARTIN (Francio)......10
BURGER (Sarlando).....10
KEISER (Svisio)....... 6

kaj fine arĥivoj kaj senpagaj sendoj (devigaj kaj al K-doj el Sovetio kaj Polio, kiuj petis pri "La Liberpensulo"):30
SUME:............150

Ni reduktis al tiu kvanto nia eldonkvanto tuj de la n°4a. Malgraŭ tio, restos deficito en nia afero, precipe pro la prezo de la afrankoj. Car ni NE VOLAS plialtigi la abonprezon, ni petas monan helpon de la K-doj, kiuj povas tion fari, kaj kiuj aprobas nian klerigan agadon. Jen por la financa aspekto.

Estas alia afero!! Eble ne ĉiuj legantoj de "La Liberpensulo" scias pri la samcelana bulteno eldonata de K-do WEICHMANN en Germanio, titolita "Nia Libera Opinio". Ni dekomence provas unuigi la du Bultenojn. Kiel unua paŝo, kunsente kun Kdo Weichmann, tuj de nun ni ne plu mencios nia S.A.T.-anecon en la titolo de La Liberpensulo, kiu aperos kiel PAROLILO DE ĈIUJ LIBERPENSULAJ ESPERANTISTOJ. Ni nepre trovu taŭgan komunan bazon, por ke la Liberpensulaj esperantistoj havu NUR UNU Bultenon, kiu estos tiel tiom pli bela kaj potenca, por nia kleriga laboro. Faru sugestojn por tion efektivigi.

Andreo GAY.

...---***-***---...

## LA FINIĜO DE A.N.S.

Jen parto de la letero, kiun ni ricevis de nia Kdo IRWIN, nin sciigante pri la morto de ANS. Ni bedaŭras tiom, kiom Kdo Irwin, la malsukceson de lia laŭda entrepreno! Espereble tia servo iam reaktiviĝos, kiam la Esperantistoj unuparte, la nanacigvidantoj aliparte, komprenos ke ni devas uzi ĉiujn rimedojn por propagandi nian idealon.

".....Kvankam la esperantistaj ateistoj bonvenigis la ANS.projekton, la naciligvaj gazetoj, krom unu gazeto, komplete ignoris niajn penojn."..... "Der Freidenker en Germanio eldonis nenion, kaj eĉ favoris la naciajn lingvojn, anstataŭ Esperanton por la interŝanĝo de novaj artikoloj, per deklaro de sia reprezentanto ĉe la Mondunuiĝo de Liberpensuloj."

"En Francio, la Liberpensula redaktoraro nacilingva eĉ ne volis pripensi serioze la uzadon de Esperanto por novaĵinterŝanĝo!.....
....."Miajn dankojn al ĉiuj rapertantoj pro ilia kunlaboro.
"Ni subtenu al la "ESPERANTO AMIKARO DE LIBERPENSULOJ" kaj al "LA LIBERPENSULO".
C. Thomas Irwin.

---...***®***...---

S i m p l a   D e m a n d o. -Kial Dio sufergas la infanetojn kaj la bestojn ?

---...***®***...---

## O R I G I N A L A J   P O E M O J

### SVEDIO LAŬDINDA !

Mi jenon vidis en svedio:
La pastroj de la sveda Dio
Semajne devas en kontoro
Okupi sin pri ŝtatlaboro,
ĉar tie la popol-publiko
Asertas, ke dimanĉ-prediko
De pastro aŭ de diakono
Ja ne sufiĉas por la mono
Ŝalajra, kiun en monato
Ciel-agentojn pagas ŝtato.
Kaj krome, diras sama kredo,
Ĉi tio estas bonrimedo
Por teni for de l'politiko
La pastrojn per labor' praktiko.
Ĉe ni en klera Germanio
Favoras pastrojn milda Dio !

### PETRO-PATRO kaj PETRO-FILO !

Petro-patro estis pioniro
Tre fervora en la klasbatal'.
Venki volis la proleta viro
La sinjorojn de l'mondkapital'.
Li malsatis, por ke lia filo
Ne sklaviĝu en minej', fabrik',
Sed li povu studi por utilo
De l'proletoj kontraŭ mistifik'.
Petro-filo studis kaj sukcesis,
Baldaŭ li fariĝis profesor'.
Kaj tre baldaŭ ekforgesis
La proletan patron la Sinjor'.
Klasbatalon ege li malŝatas,
Gin kontraŭas laŭ satul-logik'.
La maljunan patron ekspluatas
Plue la malnova malamik'.

de J. BURGER.

=======================

A L V O K O al ĉiuj franclingvaj K-doj :
Ni ĝuas specialan rabaton ĉe la eldonejo "L'IDEE LIBRE",HERBLAY. Ni petas vin mendi pere de ni ĉiujn viajn liberpensulajn librojn, kiuj ekzistas ĉe la katalogo de tiu eldonejo.
Tio malŝarĝos iom al la K-do Lorulot,kaj tio samtempe nin helpos mone.
Ni antaŭe dankas.

=======================

---

N I   R I D U   I O M. -Iam iu pastro konsigis sian preĝejan pedelon.
Post la laŭvica elnombrado de la ordinaraj pekoj,li iom atendas,kaj ĉar lia konfesanto ĉiam silentas,li demandas: -Nu,preĝeja pedelo,ĉu ci nenion forgesas ?
Kaj la alia respondis: -Ne, Sinjoro la pastro...
La pastro,kolerante: Aŭskultu,preĝeja pedelo, kiu kaŝe trinkas la vinon por la meso de Sinjoro la Pastro ? -Tuta silento... La pastro ripetas sian demandon... Nenion... kaj subite li aŭdas: -Ĉu vi scias, S-ro la Pastro,oni nepre nenion aŭdas ĉe tiu flanko.
-...Oni...? -Jen,venu tien,vi kontrolos la verecon de tio...
Ambaŭ translokiĝas tuj.
Kaj, la preĝeja pedelo demandas al la pastro: -Diru, S-ro la Pastro, kiu enlitiĝas kun la edzino de la preĝeja pedelo ?...
La pastro eliras kaj diras: -Vi pravas,preĝeja pedelo, oni nepre nenion aŭdas ĉe tiu flanko...
(Anekdoto esperantigita de A.G.)

=======================

## I N T E R   N I.

CHAVENON (Francio) Ni dankas por la sendita kopio. Ni certe uzos ĝin.

DORMONT (Usono) Ni kvitancas viajn du dolarojn,kaj bone notis ne plu sendi tiom kvante nian bultenon. Bedaŭrinde!

WEICHMANN (Germanio) Ni kvitancas viajn pagojn da 838 kaj 300 Fr. frankoj. Ni esperas, ke ni sukcesos fine kunfandi niajn du bultenojn.

DENKOWSKI (Polio) kaj POPOFF (Sovetio).
Ni ricevis viajn poŝtkartojn. Ne eblas pagi la abonon pere de SAT. Ni sendos al vi nian bultenon; vi pagos kiam eblos, aŭ per sendo de Esperantaj revuoj el via lando.

Bruno SEIGERT-Esperanto Informejo FÜRTH i.BAY Erlanger . . .Str.31 (Germanio) Tiu K-do petas, ke oni sendu al li, el ĉiuj landoj kaj en ĉiuj lingvoj, presaĵojn pri kremacio.
AL ĈIUJ: Sendu kopiojn, anekdotojn, filozofiajn artikolojn. Ni antaŭe dankas.

---...***®***...---

MENSOGO!! Iuj klerikuloj asertas iafoje,kun nekonsternebla aplombo,ke la kristanismo forigis la sklavecon! -Tio estas mensogo! Estas facile tion pruvi!
Estas dum februaro 1794,ke la sklaveco estis forigita !!

(((((*)))))

MI,tutkore tuje balotas "Jes"por la"kununuiĝo de niaj du revuetoj.Oni devus trovelekti komunan ĉeftitolon. Kaj,la nunaj fariĝi subtitoloj:GErmana,Franca,kaj esperеble sekve alvenos aliaj.Nome:Svisa,Usona,kc..Presitaj en iliaj respektivaj landoj,tiuj partoj estus senditaj kaj kunligitaj en unu(elektita)eble Svisio)en koverto komuntitolita.(Se tio estas povebla malgraŭ la landlimoj!Kc.) BARITEAUD en GRASSE :(Francio)Direktoro de franca revueto NEOS-Langages & Graphies" (Devizo: Aŭtokopiado por ĉiuj je la profito de raciaj ideologioj.



Diablo de malgranda kreteno ! Se estas por tion porti kiel iu stultulo, mi ne bezonas cin, mi tion faros mi mem !

(desegno pruntoprenita el "La Calotte")

Andreo LORULOT.-

## KIAL MI ESTAS ATEISTO ! (sekvaĵo)

### "NI SUPRENIRU SUR LA ALTAJN LOKOJN;"

Ĉiam la kredantoj provis leviĝi per aparta maniero: grimpante sur la montarojn.

Fervora amanto de la montaroj,mi ne volas fari tie-ĉi malkonvenan ironion. Neniu vidaĵo estas komparebla al tiu de la alta montaro.Oni tie plene konsentas kun la naturo sub ĝia plej sovaĝa,turmentata,impona formo. La homo konscias pri sia malgrandeco, antaŭ tiuj grandegaj neĝaj amasoj...kaj li sin sentas ridindega,ĝue rigardadante tiujn ĉirkaŭvidaĵojn majestajn kaj tute flegmajn!

Mi pasie ŝatas la montaron,sed tie mi neniam renkontis Dion§!

Mi bone scias,ke moseo surprimpis la Monton Sinai,kiam li volis interparoli kun la Ĉiama Patro.

Mi bone scias,ke la biblio ofte parolis pri la Altaj Lokoj. Tie oni faris oferojn (Abrahamo preskaŭ buĉis sian propran filon, Izaakon, por agrabli al la sangavida Jehovo). Tie oni diris preĝojn. Tie oni faris eĉ aliajn aĵojn, ĉar la Sankta Skribo al ni sciigas, ke la Altaj Lokoj fariĝis la loko de la plej malestimindegaj malĉastoj.

(Oni komencis kontentigi al Dio,kaj poste oni kontentigis sin mem).

La tradicio ne malaperis (ne tiu de la malĉasto,sed tiu de la kulto), ĉar Petro la Ermito,kiu estas ĉefredaktanto de "La Kruco",skribis en tiu pia ĵurnalo:"Ĉiu Montaro estas altaro,kiu vokas Dion."(20.I2.29).

Kial vi supozas,ke Dio prefere sin aperigas sur la montaroj? Ĉu tial,ke tio estas malpli malproksima al la paradizo?

Oni povis kredi tion,dum la nesciaj tempoj,sed nun oni scias,ke 2 aŭ 3 mil metroj pli aŭ malpli nemulte gravas por la Ĉiopova.

Oni surgrimpis la montaron,por proksimiĝi al la Suno - kaj al la bona Dio. Ĉar la unua religio,kaj la malpli stulta,konsistis je adorado al tiu varma kaj bonefika Suno...

Tio estis infane naiva,sed tio estis pardoninda. Multe pli pardoninda, ol adori dikan Koron sangan.

Hodiaŭ...ni vidis pastron soleni la meson je la supro de la Efel Turo (tio estas la plej alta MONTARO,kiun posedas la parizanoj).

Poste,por soleni la meson,oni surgrimpis Sudmontpinton,en la Pireneoj. Poste je la supro de la monto Brevento,kiu superpasas al Ŝamonikso (Chamonix). Fine la pastro Folie(Folliet)sukcesis suprenrampi Manĝetpintaĵon (Aiguille du gouter) kun siaj hostioj en unu mano,kaj sia montbastono en la alia.

"La Kruco" triumfas:"MESO SOLENITA JE PROKSIMUME 3.000 METROJN DE ALTECO." Tio estas rekordo!

Sed, ĉu Dio sin montris? Tute ne.

Ĉu li aperigis sian kontentecon pro tiu eŭkaristia ekskurso? Male.

"Surprizita de neĝa ventego",la pastro Folie (kaj liaj kunuloj) "devis rezigni pri persista daŭrigo de la surgrimpo,kaj atingis Ŝamonikson tra la Mulegoj (Grands Mulets)." ("Kruco", 4-9-3I.)

La malsupreniro estis multe malpli laciga, ol la supreniro, ĉar la pastro ne plu devis porti al la bona Dio. Sed nenio malutilas...pene suriri je 4.000 metroj por laùdegi al Dio, kaj ricevi ŝtormon, kiel dankon, tio sufiĉas por malkuraĝigi la plej bonajn intencojn.

° ° °

Ne estas dirita la limvorto, en tiu speco de malsaĝaĵo. Nune, kiam S-ro Pikar (Piccard) malfermis la vojon al la stratosfero, ni devas atendi vidi iun pastron, kiu tie iros oferi siajn akrobatajn "misterojn" - kaj iom sin pliproksimigi al sia Dio !

MALGRANDECO DE LA HOMO.-

> Kio estas iu Dio, kies oni ne timas?...
> Se oni sukcesas ne plu timi al la Dioj, estas pli bone ilin forigi.
> Felikso Le Dantek (Le Dantec).
> (La prapatraj influoj, paĝo I5I).

La religioj volonte insistas pri la malgrandeco de la homo - kompare kun sia Kreinto.

Tiu malgrandeco, estas necese ĝin akcepti.

La religio naskiĝis el la timo. Kaj la timo venas el la sento, kiun ni havas pri nia malforteco.

La praùloj adoris al iliaj Dioj sub la mistera ombraĵo de la grandaj arboj, meze de la profunda - kaj maltrankviliga arbaro.

Aliloke estis je la supro de la montoj, ke ili konsciis, kiel ni tion vidis, pri ilia sensignifeco.

Aliloke ankoraù, rifuĝintaj profunde en nigraj kaj nealireblaj kavernoj, ili petis pri la povrimedoj de la sorĉarto, kaj penis por sorĉe elpeli la malbonajn spiritojn...

Ĉiu religio komenciĝas per timotremo. Ĉiu preĝo estas konfeso de egoismo. Ĉiu adorado estas esence profitama !

Episkopa Moŝto Seran (Serrand), kiu estas episkopo de Sankta Briek (Saint Brieuc), tion naive rekonas, kiam li skribas (Religia Semajno, julio I93I) ;

"Estas afero, kiu aspektas kontraùdira kaj preskaù monstra, ke iu maristo ne estu pli religia homo, ol ĉiuj aliaj. Al kiu la malgrandeco kaj la senpoveco de la homo evidentiĝas ĉiumomente per maniero tiom alpreneganta, kiom al li?...Al kiu la grandeco kaj la potenco de Dio sin trudas per maniero tiom grandega, kiom al li, kiam la ondego senbridege minacas lin frakasi, kiel pajlan trunketon?...Kiom al li devus esti natura genufleksi, adori kaj preĝi..."

Oni ne kapablus konfesi pli malkaŝe, ke estas la timo, kiu vivtenas la religiojn - kaj ankaù la pastrojn, rezulte.

Ŝtono disigiĝis de la grota arkaĵo, kie iuj homoj kunvenis, dum la pratempoj. Kaj tamen neniu elmoviĝetis? Kaj tamen ne ventas? La ŝtono ne falis SEN HELPO. Kiu ĝin ĵetis?

La angoro kvazaùfrenezigas la spiritojn. Oni kredas ekvidi en la ombro la profilon de kruela fantomo. Kiel oni ne falus genue, propramove? Kiel ne petegi tiun fantomon, promesi al li donacon, oferon, por ke li lasu trankvila la malfortajn kreitojn, adorkliniĝitaj je liaj piedoj?

Ne timu, ĉiam estos iu ruzulo, kiu sin proponos por fari la komision, kaj kiu portos la donacon...je via nomo.

La klerulo j nomis ANIMISMO al la religia praa spiritostato.

La unuaj homoj klarigis ĉiujn fenomenojn, lokante malantaù ili konsciajn kaj agantajn volojn, nevideblajn estaĵojn, kiuj estas bonaj aù malbonaj, sed timindaj. Daùrigota.

l'Imprimeur gérant: GAY André. Imprimerie spéciale de "LA LIBERPENSULO" rue Lambert Dumesnil -HERBLAY- (S.& O.) FRANCE.





2a jaro
la kvaronjaro 1957



Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur


P O R  R A C I O ...
P E R  E S P E R A N T O ...

N°4

# LA LIBERPENSULO

L U M I G A S  N I A N  V O J O N ...


ĉiutrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado,
eldonata sub la aŭspicio de S.A.T. Liberpensula Frakcio.

Redakcio: G A Y Andreo, rue Lambert Dumesnil - H E R B L A Y (S.-et-O.)
-FRANCIO-

C.C.P.:PARIS 10.549-49

Abonprezo: 100 Francaj frankoj por dek numeroj.


# LA DOGMO KAJ LA RACIO

Neniam eble tiom, kiom nuntempe la inklino al la mirindo, magie alforĝis tiom grandan nombron da personoj. La racio perdis sian superegan potencon super la spiritoj. Estas nun la regno de la mirindaĵistoj: Ilia nombro kreskas ĉiutage samtempe kiel tiu de iliaj viktimoj! Al la malsanuloj ili promesas rapidan kaj definitivan resaniĝon el ĉiuj iliaj doloroj, sed uzante rimedojn, hontigaj por la racio, insultegaj por la moralo. Al tiuj, kiuj suferas pro mizerego, ili oferas ĉiaman feliĉegon; la tuton kompreneble kontraŭ malavara kaj tuja pago, kaj ĉiam je la nomo de iu ento, pri kiu ili estus ja ĝenataj pravigi la ĉioscian kaj ĉiopovan povon, kiun ili al ĝi aljuĝas. Kaj ili sin diras samtempe ĝiaj inspirataj kaj neerarema j ministroj.

Nune la mirindaĵistoj falis en la plej malalta superstiĉo, kaj ili ne hezitas ofte sin turni al la pastrara magio; el tio venas ilia sukceso ĉe multegaj viroj kaj virinoj, kies intelekto estas markita per la hontsignoj de la senforteco. Ili ekspluatas senhonte kaj plejofte senriske la moralan konfuzegon, kiu afliktas la homaron, konfuzego kiu estas la amara frukto de la du monmilitoj, kiuj postlasis multajn mizerojn kaj dolorojn, kiuj periigas la civilizadon.

> LA LIBERPENSULO
> ADMINISTRANTA INFORMO
>
> La abono, bazita sur la nombro de 10 numeroj kaj ne sur iu daŭro de temposervo, estas iu garantiaĵo por la abonintoj se, kiel en tiuokazo, okazas halto en la eldono.
>
> La kaŭzoj de la nuna longa kaj bedaŭrinda interrompado de la eldono inter la numeroj 3 kaj 4 ĵus malaperis kaj la eldonado tuj rekomencos laŭ la ĉiutrimonata periodeco.
>
> La Prirespondanto.

La Racio kontraŭas al la dogmo, sed en kiu senco, laŭ kiu mezuro? Gravas tion difini. La dogmo petadas universalismon; ĝi reprezentas la forton de la iluzio; ĝi plaĉas al nia mallaboremo, al nia inerteco; oni akceptas ĉion sendistinge por havi nenion por ekzameni; oni pluigas la kredon nur per obstinema malatento al ĝia objekto.

La Libera Penso, kiu tradukas esence la konvinkon, ke la homoj ne estas kondamnataj fondi la moralon kaj la societon sur necesaj kaj nekonfeseblaj mensogoj, havas ion por diri, kaj ĝi sin devas agi kun la plej granda energio, ĉar la danĝero estas ja tro reala.

La kontraŭkulturemo kalkulita estas tiom pli danĝera, ke ĝi apogiĝas sur la laboristaro, kiu estas kondamnata vendaĉi sian tutan vivon por la gajno de la pano, kaj kiu restas sencia kaj mizera. Sed la Renesanco, alia potenco, nevenkebla tiu-ĉi, senĉese grandiĝas kaj kontraŭdiras la dogmon: la aŭtoritato de la scienco. La scienco forĵetas ĉiun metafizikon; ĝi fondiĝis sur la natura leĝo; ĝi instruas kaj pruvas, ke ne estas aliaj realaj konoj ol tiuj, kiuj apogiĝas sur la observitaj faktoj. Ĝi rezone elpruvas la rilatojn, kiuj necese ekzistas inter la fenomenoj, kies la tuto konsistigas la mondon.

Sed ni ne kontentiĝu per vantaj parroloj, per magiaj formuloj kiuj liberigas el ĉiu͜ peno. Ne sufiĉas deziri la progreson, ĝin alvoki deziresprime. NECESAS ĜIN VOLI KAJ ĜIN FARI.

Nu, ni ĉeestas je malprogresaj faktoj.

Nur kalkulante kun la naturaj leĝoj kaj la spektaklo de la homaj aĵoj, oni emus kredi, ke la laborularo nune kondamnata je peniga laboro por gajni la ĉiutagan panon, fine akceptos la sklaviĝon, kiun al ili suferigas la kapitalo kaj la dogmo. La logo estas granda, fakte, kiam oni ne havas la kuraĝon aŭ la forton fari sian laboron, atendi ke ĝi fariĝu tute sola; tie estas la origino de la ,kredo al la miraklo, kaj de ĉiu superstiĉo.

La Libera Penso povas atendi sian triumfon en la mondo nur de la edukado de la popolo, de la edukado de ĝia intelekto samtempe, kiel de ĝia volo.

Per tio ĝi farigos la superstiĉon neebla, donante al ĉiuj la saĝon pri la natura leĝo, anstataŭigante je la espero de la paradizoj la laĝon de la laboro; je la ekleziula magio la agon de la homo, apogita sur la scienco kaj stariganţe kiel efika fino la tutan efektivigon de la justeco sur la tero, X...

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

ELTIRAĴO el la libro "SCIENCA ELPRUVO PRI LA NEESTO DE DIO" de Doktoro J.CARRET (Eldonejo "Idée Libre, Herblay):

1°/ Dio konas la ekzistadon de la malbono, kaj povas ekstermi ĝin, kaj ne volas tion! -Tia Dio estas malbonega, do, neakceptebla!

2°/ Dio konas la ekzistadon de la malbono, kaj deziras malpermesi ĝian agadon, kaj tion ne povas!

-Tia Dio estas senpotenca, do, neakceptebla!

3°/ Dio ne konas la ekzistadon de la malbono!

-Tia Dio estas malinteligenta kaj nekapabla, do, neakceptebla!

Esperantigis kaj sendis K-do B. NOEL.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

"A.N.S."-I N F O R M O J 1956.

R E L I G I O AŬ D I K T A T O R E C O ? (H.R. Hispanio-"A.N.S.")

Nun ni spertas kion en ĉiuj jaroj okazas en preskaŭ ĉiuj hispanaj urboj, pro ordono religia. Dum sinsekvo de sep kompletaj semajnoj (ĉijare dela 13-an de Februaro ĝis la 31-an de Marto (1956)) oni malpermesas organizi publikajn dancadojn, okaze de la granda religia fasto antaŭ Pasko, dum kies daŭro kredeble konsideras nenormala la dancado. Ĉu vere ne ridinda, Certe tio okazas en neniu alia lando.

Des pli interesa estas la fakto por ĉiuj legantoj, ke en la pasinta jaro mastro de granda dancsalono petis permeson al la urbestro por ekfunkciigi sian negocon. "Vi povas tion fari", respondis la urbestro,"ĉar ne ekzistas urba leĝo malpermesante ĝin, tamen mi kredas prudente rekomendi al vi ne riski al tio".(Similaj dancejoj antaŭe jam estis fermitaj pro katolika devigo).

BERLINO, Marto 1956. ("A.N.S.")

La protestanta eklezio protestdeklaris kontraŭ la nova leĝo de la orientparta Germanlando, laŭ kiu en popollernejoj la religiinstruado nur estas permesata post la elementalernplano. Sed doni religi-instruadon en altlernejoj, laŭ ŝtata dekreto estas malpermesite tute.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

LA KLERIKEMO, jen la MALAMIKO !!

Gambetta.

*****************************************************************************************

La n°5 (2-a kvaronjaro 1957) de La LIBERPENSULO povos verŝajne eliri dum Junio.

*****************************************************************************************

Tre taŭgaj, tre sagace elektitaj estas la artikoloj de La Liberpensulo. Niajn gratulojn al la Prirespondeculo kaj liaj kunlaborantoj.

Tamen, tie ni multe scias pri la kritanaj religioj. Sed pri la aliaj, ĉu iu povas nin informi?

Oni diras ke la budhista estas multe pli deca. Ĉu tiu aserto estas vera? Tamen se budha pastraro uzas sian tutan vivon por preĝi kaj almozi, ĉu estas tre utila afero por la socio ? La socio devas helpi la necesbezonulojn, sed la plenfortuloj devas labori se ili volas manĝi. Oni tute ne bezonas pastrojn aŭ specialistojn por preĝi por ni.

Bariteaud H.

Andreo LORULOT.- KIAL MI ESTAS ATEISTO!

(Vidu la komencon de tiu traduko sur la n° 3a.)

Liaj asertoj estas,tamen,multe pli verŝajnaj,ol tiuj de la kredo. Kaj lia kuraĝo estas pli konvinka;ol mia timemo,rilate al tiuj preskaù ĉiuj kiom tiom kaj pli ol li bezonas certecon.

Verkante la saman libron,ofte mi estus provinta pli nuancajn,pli ŝanceliĝemajn parolojn,kaj sub lumo variante siajn rebrilojn,pli ŝanĝkoloran.Tiel mi estus ĝojiginta miajn skeptikecon kaj revemon;tiel eble mi estus loginta la dek virojn el mia epoko,kiuj amas en la dubo"dolĉan kapkusenon por bone farita kapo".

Sed Lorulo konvinkos la memvolajn simplulojn,kaj li ne lasos nekontentaj la sincerajn malsimplulojn.Tiu memfida propagandanto estos senlime pli utila,ol estus estinta Psikodoro.La poeto,kiu en la ekvilibrecoj de la nuboj kaj de la stelaj lumigoj kantas siajn ridetojn kaj ŝanceliĝojn,estas tro elreviga por la popolamaso.

Pli mi tion pripensas,pli mi preferas la libron de la solida Lorulo al tiu,kiun estus povinta verki pri la sama problemo iu maljuna neforigebla revemulo,kiu subskribas... Han RINER.

---

ENKONDUKO DE LA VERKISTO.- Oni estas DEISTO sente;oni fariĝas ATEISTO rezone.
Andreo LORULO.

Mi parolos pri Dio... ĉu mi do havas tempon por perdi ?

Ĉar li neniam zorgis pri mi,kial mi min okupos je li ?

Nur unu taskon mi devas plenumi:Vivi.Tasko,kiu estas tiom sendanka, kiom vana _ kaj rapida...

Vivi en mia sfero.Tuj kiam mi provas eliri el ĝi,mia frunto kolizias al la nekonato.Ĉiuj miaj klopodoj restas vanaj,aù preskaù vanaj: mi nur povas koni min mem,kaj malbone.

La mondo restas kaŝita.Mi kredas diveni fragmenton de vereco,kaj mi ĝoje min ekĵetas.Sed malantaù la vereco eltrovita,estas ĉiam la sama nesondebla abismo...

Tiom da homoj parolis pri Dio!

Tiom da libroj estas skribitaj pri Li!

Kaj mi ne multe atingis.Tiuj homoj nenion elpruvis.Tiuj libroj al ni nenion instruas.El ĉiuj,tiu filozofa kaj religia konfuzaĵaĉo eliĝas preme malgajaspektan enuon,sentaĵon de kompateginda senpoveco...

En tiuj kondiĉoj,kial verki tiun novan libron?Ĉu mi naive pretendus sukcesi tie,kie tiom da aliaj malsukcesis?

Mia modesta plumo ne trafos,kara leganto,en tiu mokindaĵo.

Mi opinias,ke oni multe malbonfaris je la nomo de Dio.Mi pensas, ke estas tempo nin liberigi de tiu fantomo.Mi,elmontras,kiel mi sukcesis vivi sen Li,pensi sen Li,kontraùbatali tiujn,kiuj Lin uzas.

Estas ĉio.Sed sufiĉas.Kaj mi estos ne perdinta mian tempon,ankaù ne mian inkon,se la legado de tiuj paĝoj permesos al iuj foriri el la malnova kaj terura Mensogo,por pensi libere,kaj vivi same... A. LORULO.

---

ĈU LA EKZISTADO DE DIO ESTAS EVIDENTA ?

Laste,katolikajurnaleto (Mi Utilas)entuziasme reproduktis iun neatenditan humoraĵon,atribuita al la simplanima Bernardino de Sanktulo Petro (Bernardin de Saint-Pierre).

Tiu dolĉa filozofo iu tage estus deklarinta;"Se mi volus pruvi al vi la ekzistadon de la Kreinto de la naturo,t.e.de Dio,mi kredus ofendi al vi kaj al mi;mi min kredus tiom malsaĝega,kiom se mi volus rezone

Bernardino estis certe sincera. La pruvo estas, ke li publikigis nur fantaziajn aŭ filozofajn verkojn, kaj tre malmulte da teologiaj.

Ha! tiuj dikaj libroj pri la ekzistado de Dio, je 798 paĝoj in 8°! Tiuj dikegaj volumoj flavigantaj sub la polvo de la libroŝrankoj! Tiuj frenezegaj disertacioj, kiujn neniu legos, neniam!

Mi kredas je la sincereco de la naiva Bernardino; sed iom malpli mi kredas je la sincereco de tiuj, kiuj lin paroligas.

Antaŭ ĉio, ĉar ili defendas iliajn profesiajn profitojn, kaj mi konas neniun korporacion, tiom avida al la gajno, kiom tiu de la pastroj.

Kaj poste, tial ke...tiu ideo estas sensenca!

Se la ekzistado de Dio estas vere nekontestebla kaj luma, mi min demandas, kial ni havas en Francio 30.000 pastrojn, kiuj provas tion elpruvi! (I)

Neniu homo, eĉ se li estus pensionano en Ŝarentono (Charenton, fame konata frenezulejo apud Parizo_Noto de la trad.), neniam havis la ideon publikigi libron por pruvi, ke la suno ekzistas...

Neniu homo, eĉ se li estus vivinta dek-du jarojn en seminario, neniam havis la spiriton sufiĉe malklerigita por deklari, ke la suno ne ekzistas.

Neniam oni brue interdisputadis pro la suno. Oni nek ekskomunikis, nek masbuĉis.

La astronomoj neniam depostulis la teruran monopolon, kiu konsistas je kapti la infanon tuj de lia unua juneco, por enradikigi en lia spirito, dogme, la principojn de la scienco, kiun ili instruas.

Cetere, la fundamento de tiuj principoj estas la Libera Ekzameno, kaj la Observado.

Ĉiu povas vidi la sunon. Ĉiu povas kompreni, post plej simpla klarigo, kiel ĝi rolas al la Tero, kaj al siaj aliaj satelitoj.

La kredo estas tie superflua. Iom da racio sufiĉas.

Estas do neniu komparo farebla inter la Suno kaj Dio, inter la Astronomo kaj la Pastro, inter la racia homo kaj la religia homo.

Ne nur la ekzistado de Dio ne estas evidenta, sed la kredantoj mem tute ne akordiĝas pri Li.

Ili ja konsentiĝas por aserti, ke Dio estas. Sole, tuj kiam temas Lin difini, ili pasie interdisputas.

La dogmo devas dume okazi, kaj ĉiu religio havas la sian. Oni trudas al la kredanto tian, aŭ alian formulon pri Dio. Estas nure per la aŭtoritato, ke la religioj estas eblaj.

Malgraŭ tio, demandu la mezklerecajn kredantojn; demandu al ili, iom sciigi al vi pri la Diaĵo, kiun ili amegas tremante. Inter cent kredantoj vi ne trovos kvar, kiuj scipovos prezenti al vi ideon, proksimume inteligenta kaj kvazaŭe klara.


"Se iu, diras la episkopa kunveno de la Vatikano, firme asertas, ke la diaĵa revelado ne enhavas ĝustasencajn misterojn sed, ke kleriga racio povas ĉiujn kompreni kaj elpruvi: LI ESTU ANATEMULO!" (Pastro Mikaelo, paĝo 67-a.).

---

(I) La Pastro de Sanktulo Petro ne konsentas cetere kun la "Sankta Skribo", ĉar oni povas legi en la libro de Job (XI-7): "Ĉu ciaj esploradoj povas al ci trovigi Dion?; ĉu ci povas rekoni la perfektecon de la Ĉiopova? Ĝi estas pli alta, ol la Ĉielo; kion ci povas fari?; pli profunda, ol la infero, kion ci povas vidi en ĝi?

Daŭrigota.

L'Imprimeur-gérant: GAY André. Imprimerie spéciale de "La Liberpensulo"
rue Lambert Dumesnil -HERBLAY- (S.& O.) FRANCE.



POR RACIO... Ia Jaro Januaro-F-Marto
PER ESPERANTO...

ESPERANTO INTERNACIO

N°2

# LA LIBERPENSULO

LUMIGAS NIAN VOJON...

Ĉiutrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado,
eldonata sub la aŭspicio de S.A.T. LIBERPENSULA FRAKCIO.

Redakcio: G A Y Andreo, rue Lambert Dumesnil - H E R B L A Y (S.-et-O) -FRANCIO-

-C.C.P. PARIS 10.549-49-

Abonprezo: 100 Francaj frankoj por dek numeroj

Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur

## ETERNA OPIO

Jam de la praepoko ĉiufoje kiam homo ne kapablis solvi problemon, li kreis mitojn kaj diojn. Se taglumo favoris lin, la nokto estis puno. Se dumtage li povis ĉasi bestojn por akiri nutraĵon, li devis dumnokte fuĝi en la grotoj, en kiuj la ombroj desegnis terurajn figurojn, kiuj malfavore impresis lin. La ventego, fulmotondroj, frostego, eklipsoj estis motivoj por naski strangajn songôjn.

La prahomo, similis al hodiaŭa formiko troviĝanta sur Egipta piramido. Li ne konsciis pri la terglobo nek pri la klimato. La ĉielaj fenomenoj ne estis klarigeblaj kaj geografio ne havis praktikan utilon. Li nur uzis la nepre necesajn rimedojn kaj sin vestis per la feloj de la bestoj. La plej ruzaj kaj fortaj el la tribo komandis kaj oni tuj komprenas kiom facile la sorĉistoj ekspluatis la necion de la primitivuloj. (Ni ne estas certa, ke la afero estas alia hodiaŭ). Ni vivas en moderna sociordo, en kiu homo rajtus vivi laŭplaĉe. Abundo regas. La nuna tekniko permesas al ili akiri ĉiajn utilaĵojn por komforte vivi. Ĉio en la vivo ŝajnas rideti al la homo. Ĉiutage klerulo eltrovas mirindaĵojn, kiuj plifaciligas nian ĉiutagan vivon.

Kvankam demokratio lamas, la individuo povas legi, studi, vojaĝi, instruiĝi kaj kompari, tamen la sorĉistoj regas.

Ili ne plu gluas plumojn sur la vizaĝo, ili ne plu farbas la korpon, ili ne plu surmetas teruriĝajn vestojn aŭ strangajn amuletojn, sed tamen ili ekzistas.

La modernaj sorĉistoj estas ankoraŭ facile rekoneblaj inter aliaj homoj. Ili sentas la ..zonon porti distingeblajn vestojn kaj dum la ceremonioj oni ankoraŭ povas vidi ilin kun strangaj amuletoj kaj objektoj en la manoj kaj sur la korpoj. La diferenco inter la prasorĉisto kaj la hodiaŭa estas, ke la nuna portas multe pli riĉajn vestojn en pli riĉa kaj moderna medio. Tute samaj estas la ritoj.

Kial do homo ne sukcesis forigi tiajn prahomajn restaĵojn ? Mil respondoj tuj alvenas nian menson. Oni povas sentime aserti, ke la ĉefa estas, sin apogi sur mitoj.

La eklezio, kiu estis ĉiopotenca, kiu sole estris la instruadon kaj kiu bruligis herezulojn, ne kapablis bari la vojon al progreso. Sed ĝi lasis la iluzion, ke homo devas timi, ke super li regas nekomprenebla kaj mistera potenco. La nuna sorĉisto ne kapablas varbi klerulojn, sed veraj ateistoj ne estas multnombrajn. Kaj eklezio bone agnoskas tion. Pro tio la nuna sorĉisto uzas pli praktikajn rimedojn. Ek de la naskiĝo, li mistifikas. Je la nomo de la "Ĉiopotenco" oni adeptigas homidon al kadukaj ritoj, kiujn li senkonscie enkorpigas. Iom post iom li englutas la sorĉistajn parolojn, kaj kune grimacas kun la aliaj. Kiam li estas 12 jara, oni donas al li la unuan komunion. Lia cerbo jam ne plu estas virga, sed similas impresiĝema fotografa plato, kiu estas preparita por ricevi la efikon de la lumradioj. Anstataŭ lumradioj, la mistifikuloj iom post iom inokulas opion, kiu nebuligas kaj bremsas la homan evoluon. Dum lia tuta vivo, homo restas sub la efiko de tiu opio.

La rolo de la morgaŭa socio estos prepari liberajn homojn per tute nova edukado, kiuj naskiĝos libere, sentime, sen la perforteco de la modernaj sorĉistoj, kiuj nur celis ĝis nun malhelpi la liberigadon de l'homaro. (Eklezio jam agnoskas la fakton kaj klare scias, ke ĝi malaperos, kiam homo tute nature evoluos). Tiam homido povos kaj rajtos disvolviĝi kaj aspiri al plena konsciado, ĝui ĉianjn modernajn por fine realigi la modernan sociordon en kiu homo nature kaj feliĉe vivos.

Originale de MARSO.

ESPERANTO-
INFORMEJO
FÜRTH i. BAY
Erlan...

PENSU, NE KREDU !

Jen sata pastro staras,
ĉielon montras li :
"Pli bona vivo venos
Post tiu vivo ĉi
Ne evitebla estas
ĉagreno kaj sufer',
ĉielo rekompencos
Pro malfeliĉ' sur ter'!

Mi estas la agento
De nevidebla Di',
Per preĝoj al la estro
Vin rekomendas mi.
Cielon mi malfermas
Por iom da salajr',
La nekreduloj brulos
En la infera fajr'!"

Ne kredu liajn dirojn,
Neplu subtenu lin !
Ne pagu al la pastro,
Car li friponas vin !
Ne pagu plu impostojn
Al netrovebla di'
Kaj serĉu la feliĉon
En tiu vivo ĉi !

EKLEZIA RIĈECO !

Dum kaj post la mez-epoko
Preskaŭ jam sur ĉiu roko
Vojrabistoj en kastelo
Bone vivis nur per ŝtelo.

Laŭ tiama fimoralo
Rabo estis ne skandalo,
Se ĝin faris nur baronoj
Aŭ krimuloj sur la tronoj !

(Same kiel ankaŭ nun
Por prolet' nur estas pun' !)
Sed nobelaj partizanoj
Estis ankaŭ bonkristanoj.

Por eviti la inferon,
Ili donis rabaĵeron
Al konsenta eklezio
Je la glor' de l' kara Dio!

Kaj la eklezi-stomako
-Jen avida kaŭĉuk-sako-
Fordigestas ĝin sen peno,
Ne demandas pri deveno !

Miru ne pri harmonio
Inter graf' kaj eklezio !

(Originalaj poemoj de Josef BURGER)

LA EKLEZIO POSTULADAS...

La nuntempaj postuloj de eklezioj, ĉefe de la katolika, koncerne privilegiojn en lernejoj kaj religion dum instruado de la geknaboj demonstras denove : neniam kaj en neniu lando, aŭ sub ĉiaj registaroj, la eklezioj ĉesos lukti kaj batali kun la celo starigi la eklezaijn leĝojn super la leĝoj de la ŝtata leĝaro !
Rigardante la konkordatan disputon en Germanio aŭ en Belgio, pro edukado "laŭ religiaj, ekleziaj limoj, ", ĉiu liberpensulo povas imagi la fin-celon de tiaj postuloj.
Dum la mezepoko la potenco de la katolika eklezio en Eŭropo estis preskaŭ senlima; eĉ imperiestroj ofte estis sub la jugo de ekleziaj leĝoj kaj punoj.
La papo kaj lia servistaro per ĉiuj rimedoj "haltis" sur sia loko, kaj regis la piajn animojn.
Nuntempe la scienco, tekniko, kaj la libere pensantaj homoj, parte limigis la senfinan postulon de la eklezio, sed la batalo daŭros.

Pro tio, liberpensuloj en ĉiuj landoj pripensu situon, raportu, korespondu pri tiu-ĉi temo en ĉiuj lingvoj; se lingvo limo aperas, uzu Esperanton kiel peranton; ŝanĝu ideojn kaj la malverecon..."
Ne forgesu: La eklezioj ankaŭ batalas per supernaciaj rimedoj, inter aliaj Esperanto!, libroj, ktp,.
Nu, liberpensuloj: Agu, aŭ vi estos "subuloj" de la eklezio.

Originale de B.S., Germanio)

-CITAĴOJ-

Ĉiu progreso kiu efektiviĝis en la tuta Kristana Mondo, pri Scienco, pri Libereco, pri Bonstato, kaj en la Artoj de la vivo, disvastiĝis malgraŭ la Eklezio, kaj inverse proporcie je ĝia potenco ! (Macaulay)

* * *

Se la Krista moralo kondamnas la militojn, la Religioj kontribuis ilin multigi kaj pligravigi !

* * * (G. Duhamel)

Estas io terura en la penso, ke la superstiĉo estas la sola religio de la kamparano; ke lia kulto konsistas nur en kelkaj agoj kiujn li ne komprenas, kaj kies sencon kaj devenon li neniam scios; kaj ke Dio estas por li, nur idolo kiu favoras la rikoltojn kaj la bestarojn de tiu, kiu bruligas kandelegon aŭ aĉetas sanktan bildon !

(G. Sand)

* * *

Ĉu mi havas senmortan animon ? Ĉu mi povas ankoraŭ havi tiun antikvan kaj naivan esperon? Milionoj da homoj, kiel mi, ne plu kredas je tiu malebla feliĉo !

* * * (G. Duhamel)

Oni rakontas, ke maljunulino, resanigita per danĝera operacio, diris al la lerta ĥirurgiisto: "Ha! Sinjoro Profesoro, kun la Bona Dio vi savis min!". Kaj la profesoro respondis : "Lasu do vian Bonan Dio, trankvila, Sinjorino; Li ne faras tiujn operaciojn!"

(A. Scubiran)

Komunikis Ŝartel

---

KAJER-KOVRILO presita sur belkolora fortika papero verda, kun desegno kaj tekstoj celantaj enprofundigi la pacan ideon en la infanaj cerboj, aperigis Departementa Sekcio en S.& O. (Francio) de Nacia Komitato Kontraŭ Milito kaj Premtiraneco.- Du tekstoj aludas pri Esperanto.- La Kajer-Kovrilo estas havebla ĉe K-do G. DUVAL, Instruisto E C H A R C O N par M E N N E C Y (S.-et-O.) FRANCIO.

---

LASTMINUTE.-La papero kun tipopresita titolo sendita de Kdo Pokgiem el St Louis tro malfrue trafis nin(je la 16an de februaro). Ni uzos ĝin por la n°3. Alie, la franca dogano multekostis al ni. Ve !

KELKAJ MINUTOJ KUN MAJSTRO...

Jen paĝoj eltiritaj el "La Kvina Evangelio". Estas tiuj mem, kiujn elektis Manuelo Devaldes por sia Rinera antologio "La Malbelaĝoj de la Religio". Jam la manuskripto de "La Kvina Evangelio" atendas ĉe S.A.T. favoran momenton por ĝia eldono Esperante. Estas tasko nia kiel eble plej helpi al la eldono de tiaj majstraj verkoj, kaj ni estas feliĉaj se nia laboro incitos niajn amikojn, nin helpi en tiu tasko.

.....

De malmultaj tagoj Jesuo estis profunde en la dezerto; kaj li marŝis kun bastono en la mano; kaj multaj akridoj ekflugis je la bruo de sia bastono kaj je la bruo de siaj paŝoj.

Ekflugante, ili vidigis sub sabl- aŭ rok-koloraj flugiloj, kiuj malhelpis al la birdoj ilin ekvidi, bluajn aŭ ruĝajn flugilojn.

Kaj Jesuo laŭdis al la Eternulo, ĉar li donis al tiuj bestoj grizan mantelon, kiu protektas ilin, kaj ĉar li metis sub tiu mantelo pli delikatan kaj pli brilegan veston, ol tiu de Salomono en sia tuta gloro.

Nu, proksime al la loko, kie Jesuo trapasis, estis spina kaj seka herbotufo. Kaj malgranda akrido, volante eviti la jesuan piedon, sin jetis ĉe tiu arbustotufo en araneaĵon.

Al la araneo ankaŭ la Eternulo donis brilegan veston, kaj ĝiaj piedetoj kaj ĝia ventro estis kovritaj el nigraj cirkloj kaj el flavaj cirkloj, kiuj ŝajnis kvazaŭ ili estus faritaj el riĉa veluro.

Sed sin ĵetante sur ĝia kaptaĵo, la araneo je la malbelega ventro kaj je la belaj koloroj ĝin ligis per la multaj fadenoj,kiuj eliris el ĝia korpo.

Tiamaniere ke envolvita per vindoj, la akrido kiu estis mortonta aspektis kvazaŭ la infano, kiu ĵus naskiĝis.

Jesuo disŝiris la araneaĵon per sia bastono, kaj tenante en la manoj la malfeliĉegan kreitaĵon, li ĝin liberigis el la subtilaj vindoj: kaj li atentegis ne ĝin disŝiri aŭ vundi.

Sed, kiam ĝi estis liberigita el ĉiuj fadenoj, ĝi restis sur la mano de Jesuo nek eksaltante, nek ekflugante. Kaj ĝi longe konvulsie tremis pro agonio.

Jesuo komprenis, ke la araneo ĝin pikis mortige. Kompate, li finis la kruelan laboron de la araneo kaj buĉis la akridon.

Kaj, rigardante la araneaĵon, kiu pendis tute disŝirita,li malĝojiĝis dirante: Mi ruinigis genian laboron, kiu necesis al la malsato de tiu-ĉi.

Kaj la akrido, kiun li perforte forprenis vivanta de la araneo, li ĝi redonis mortinta.

Sed la araneo malŝatis tiun kaptaĵon, malpurigita ĉe la kontakto de la homo.

Vidante tiujn aferojn, Jesuo diris: Mi volis la bonon kaj mi faris la malbonon. Mi plidaŭrigis la agonion de tiu, kiu suferis. Kaj mi senigis je nutraĵo tiun, kiu malsatis.

Tiamaniere ke, ne estante satigata ĝi frapos alian viktimon. Kaj tiu nova mortigo estos mia laboro.

Tamen mia koro estas bona, kaj mi tie faciligis la vojon de la Sinjoro. Kial do la rezultato de mia enmikso estas malbona ?

Tiam li rigardis al la ĉielo, dirante: Patro, kiu estas en la ĉielo, klarigu al mi ĉian justecon kaj cian korpardonon. Ĉar aspektas al mi, ke la malsato de la araneo, la morto de la akrido, kaj la senpovo de mia bona volo, estas kulpigo kontraŭ ci.

Kaj mi kredas aŭdi sur la tuta tero la grandan lamenton kaj la grandan tumulton de la kreitoj, kiuj akuzas la Kreanton.

Dum li marŝis pripensante, jen sub sia piedo li sentis malfortan kontraŭstaron cedante, kaj li aŭdis kraketon.

Kaj sin turnante posten li vidis, ke li senintence premegis insekton Kaj li demandis ankoraŭ: Patro, patro, mi al ci tion demandas, kiu do kulpas pri tiu mortigo ?

Han RINER, "La Kvina Evangelio" (paĝo 46 ĝis 48)
esperantigis Gajulo.

---

"ATEISMA NOVAJ-SISTEMO" (mallongige "A.N.S.") INFORMOJ.

ORIGINO DE LA VIVO. Pasadana, Californio. (ANS, Junio 1955) Sciencisto Stanley Miller de la Kalifornia instituto de Teĥnologio de Pasadena priskribis kelkajn el siaj eksperimentoj antaŭ la Botanika Socio de Usono (Botanical Society of Amerika) kaj la orienta sekcio de la Usona Asocio por la Antaŭeniro de la Scienco (AAAS). Miller diris, ke li submetis miksaĵon de gasoj - similaj al tiuj el kiuj konsistis la atmosfero de nia planedo antaŭ bilionoj da jaroj - al elektra malŝarĝo dum unu semajno. La gasoj (akvo, amoniako, hidrogeno kaj metano ŝanĝis dum tiu semajno al aldehido kaj hidrogena cianido. Sekve, tiuj lastaj ĥemiaĵoj reakciis kun akvo, formante amino acidojn KIUJ ESTAS LA BAZO DE NIA VIVO - de niaj vivaj korpaj strukturoj.

RELIGIA NETOLEREMO EN NEDERLANDO. (ANS, Decembro 1955): Ĝis la jaro 1955 ekzistis en Nederlando leĝo el la jaro 1809a kiu nur pritraktis la enterigon sed ne la kremacion.

Tamen en la jaro 1875a estis fondata la societo por nedeviga kremaciado, kiu en la jaro 1914-a konstruigis kremaciejon.

La registaro ne povis malhelpi kremacii mortinton, ĉar la mortinto estis la ordoninto, kaj mortinton oni ne povis juĝe persekuti.

Intertempe laborista societo por kremaciado estis fondita kaj la nombro de la anoj de la du societoj kreskis ĝis pli ol 1000.000.

Dua kremaciejo estis konstruita.

Tial la registaro decidis revizii la malnovan leĝon kaj prezentis leĝoprojekton al la parlamento. La katolikaj kaj protestantaj (kristanaj) parlamentanoj preskaŭ ĉiuj estis kontraŭ kremacio, kaj la ministro kiu preparis la novan leĝon estas katoliko. Li elpensis kiel eble plej obstaklojn. Ekzemple: la nova leĝo postulas ke ĉiu persono, kiu post sia morto deziras esti kremaciota, deponu skribitan ateston; aneco de kremaci-societo ne valoras.

Nur al la kremaci-societoj estos permesata konstruigi kremaciejojn; la leĝo ne permesas al komunumoj doni monan subtenon por konstruado de kremaciejoj.

Unu artikolo permesas la kremaciadon de infanoj malpli aĝaj ol 18 jaroj se la gepatroj tion deziras, kondiĉe ke ne la infano dum la lasta jaro de sia vivo estis edukita en instituciio aŭ en familio kiu ne favoras la kremaciadon. Tiam okazos enterigo, do kontraŭ la deziro de la gepatroj.

La socialista partio de la laboro kaj la katolikoj estas la plej grandaj partioj en la parlamento. Ili ambaŭ kreis la ministraron.

La plej hontinda fakto estas, ke la socialistoj subtenis la projekton de la katolika ministro. Nur la liberaluloj forte atakis la leĝoprojekton kaj defendis la liberecon de konscienco, sed ne ricevis subtenon de la socialistoj.

---

ATENTU! Tuj de la numero 3 a, "LA LIBERPENSULO" aperigos felietone verkon de A. LORULOT, viceprezidanto de Mondunuiĝo de Liberpensuloj, esperantigita de Gajulo, titolita "KIAL MI ESTAS ATEISTO".
Tuj de tiu tria numero, nur la K-doj kiuj abonis, aŭ kiuj mendis regule kvante nian bultenon, ricevos "LA LIBERPENSULO'N".

La redakcio.

ATEISMA NOVAĴ-SISTEMO kaj MONDUNUIĜO de LIBERPENSULOJ

I.-KIO ESTAS "ANS" ? Estas internacia sistemo de informo, kies celo estas permesi al la tutmondaj liberpensulaj ĵurnaloj ricevi, dank' al Esperanto, interesajn informojn el diversaj fontoj. "ANS" elpensis K-do Irwin el San Francisko, kaj tuj aprobis krom mi mem :

"DER FREIDENKER", germana liberpensula gazeto.

"TRUTH SEEKER", usona liberpensula gazeto, tiu lasta dirante :

"Ĉar ni ne povas pagi alilandajn korespondantojn, ni devas postrikolti informojn en la ĵurnaloj. Iam ni eĉ ne scias pri okazaĵoj, kaj kiam ni ekscias pri io, estas tro malfrue."

II.-KION FARI POR "ANS"? Inter niaj frakcianoj, jam WEICHMANN por Germanio, kaj KEISER por Svisio akceptis esti raportantoj. Estus bone, se franca frakciano akceptus esti raportanto, kaj ankaŭ po unu frakciano el ĉiu lando, kie nia voĉo aŭdiĝas. Kiuj pretas tion fari, tuj rilatu kun la nuna respondeculo de "ANS" : C. THOMAS IRWIN
804 Turk St. San Fransisko 2 Californio
USONO.

Mi mem tuj provis oficialigi "ANS" ĉe liberpensula Mondunuiĝo. Pro tio mi tuj sendis la regularon kun klariga letero al LORULOT, COTEREAU kaj LAS VERGNAS, instanculoj ĉe franca federacio de liberpensuloj. Tio okazis la 22an de Julio 1955, ĵus antaŭ la franca kongreso en Marsejlo.

El tio rezultis: Unue citado de "ANS" projekto ĉe la marsejla kongreson, kaj decidon transdoni ĝin al la internacia Estraro. ("Libre Pensée" Aŭgusto-Septembro 1955.)

Due, kiel decidita dum la kongreso el marsejlo, LORULOT prezentis nian projekton ĉe la estraro de la Mondunuiĝo. Ni povis legi en "Libre Pensée", Oktobro 1955, sub la rubriko "La Laboro de la Mondunuiĝo" :

".....Ĉeestis: la K-Doj BRADLAUGH el Londono, Prezidanto; J. GREMLING el Luksemburgo, Andreo LORULOT, Vicprezidantoj; Henrikino PARDON el Belgio, Sekretariino; COURTOIS, Kasisto; BOULANGER (Belgio), COTEREAU (Francio), J. de RONDE kaj RAUSCH (Nederlando), RIDLEY (Britio), FREIZSCHULLER (Germanio).

".....LORULOT legas projekton, prilaborita de Esperantistaj K-doj el Francio (Erareto. La projekton elpensis K-do IRWIN el Usono, kiel ni jam diris) por starigi internacian informan centron, helpe de Esperanto. FREIZSCHUELER sugestias, ke la internacia Estraro plibone starigu oficon de dokumentado, kun tradukoj en lingvoj franca, brita kaj germana. Tiu propono estas aprobata."

III.-KONKLUDO. Ĝis nun ni ne sukcesis oficialigi "ANS". La tasko de ĉiuj estas de nun klara. Ĉiu el niaj K-doj, ĉiu en sia propra lando, tuj skribu rekte al la K-do ano de la Estraro de Mondunuiĝo, protestante kontraŭ la decido de la Estraro, sekve de la propono de K-do FREIZSCHULLER el Germanio.

Ĉiuj al viaj plumingoj, kaj precipe en Germanio, el kie venis la bato! FREIZSCHULLER kaj "DER FREIDENKER" nepre ricevu multajn protest-leterojn, Esperante skribitajn!!

Kiel jam faris UNESKO la 10an de decembro 1954 a, Liberpensula Mondunuiĝo nepre reviziu sian pozicion rilate al Esperanto!!

Andreo GAJULO.

Noto.- La Estraro studis en kiuj kondiĉoj grupo de Esperantistoj povos ĉeesti la venontan kongreson de Mondunuiĝo. Nepre la Mondunuiĝa Kongreso akceptu oficialan delegitaron el niaj anoj! Tiu delegitaro nepre enkonduku diskuton pri "ANS", se tiu afero ne estus solvita antaŭ la kongreso.

INTER NI !! Sub tiu rubriko ni aperigas respondojn al ricevitaj leteroj,kiam tiuj respondoj prezentas ĝeneralan intereson. "la Redakcio"

LIEDERMOOY (Nederlando).-"Ni petas vin rezigni pri "La Liberpensulo" kaj kunlabori kun Weichmann, por ke li povu daŭrigi la eldonon de "Nia Libera Opinio", de " Liberpensula Esperanto Amikaro".

Respondo.- Ni pensas, ke nepre ni devas klarigi la situacion, ĉar eble kelkaj K-doj same opinias, kiel Liedermooy. Fakte, jam K-do Personne el Francio petis nin ne plu sendi al li "La Liberpensulo'n":Tiu K-do aniĝis al L.E.A. de Weichmann.Ni tuj diru,ke Weichmann estas frakciano,peranto nia por Germanio. Li estas tre aktiva K-do, kaj ĉiam helpas al nia "La Liberpensulo." Ni sendas al li regule 30 ekzemplerojn el ĉiu numero.

Dum la unuaj tempoj,kiam ni ankoraŭ ne trovis rimedon venigi monon el Germanio al Francio, ni mem konsilis al Weichmann uzi la monon de la germanaj K-doj por propagandi en Germanio,se eble per aperigo de bulteno. Tiam naskiĝis "Nia Libera Opinio".

Tamen la starigo de "L.E.A."estas laŭ mi mispaŝo, pro du kialoj :

I[e].-Niaj fortoj ne permesas al ni posedi du organizojn por esperantistaj liberpensuloj, ĉiu kun sia revueto.

2[e].-La fakto,ke estas SAT-Frakcio de Liberpensuloj, kiu aperigis Esperantistan Liberpensulan Bultenon, ne devas esti obstaklo al racie pensantaj homoj. La prezo de la abono al "La Liberpensulo", kiu eĉ ne estas la prezo de la kliŝoj, inko kaj afranko, ankaŭ ne estas obstaklo.

"Nia Libera Opinio" estas kvazaŭ ido de nia frakcio kaj de "La Liberpensulo".Ĉu la infano petus de la gepatroj,ke ili sin mortigu ! Ni tion ne akceptus,kaj ni certas,ke ankaŭ Weichmann tion ne volus!!

"Nia Libera Opinio" fariĝu germana folio de nia komuna "La Liberpensulo". Kiuj ne volas fariĝi SAT-anoj aŭ SAT-frakcianoj,tiuj ne fariĝu. "La Liberpensulo" nur estu la bulteno de ĈIUJ liberpensulaj Esperantistoj! Tiam, ni havos ĉiam pli belan revueton. Kaj estas sufiĉan laboron por ĉiuj; ĉiu laŭ sia eblo, ĉiu en sia medio; vidu nian artikolon pri "ANS", ekzemple !!

Otto RIECK Regierungsrat A.D. 2Ib FREDEBURG-Sauerland-(GERMANIO).

Tiu K-do nepre bezonas "Catéchisme pour adulte" de Coulange (Pseùdonimo de Turmel) el la eldonejo Rieder, por finverki libron. Tiu libro ne plu estas havebla en librejo. Se iu K-do povos ĉu prunedoni, ĉu vendi tiun libron, li skribu rekte al K-do Rieck.

WEICHMANN (Germanio).-Ni kvitancas vian poŝtmandaton de Decembro.La eldonkvanto de "La Liberpensulo estas 250. Ni skribas detale al vi,kaj eble nia letero vin trafos antaŭ tiu numero de "La Liberpensulo".

SAT-ano 21.473 (Usono).- Ni dankas al tiu K-do, la unua kiu aŭdis nian alvokon pri kolektiva laboro. Ĝia propono permesas al ni tuj de tiu dua numero, eldoni "La Liberpensulo'n" ses paĝe.


KEISER (Svisio).-Ankaŭ tiu K-do nin multe helpas. Ĉar li ne povus vere longe fari tion por nia bulteno, ni provas lin malŝarĝi el parto el lia tasko tuj de la tria numero de nia revueto.

AL ĈIUJ.-Bonvolu ĉiam precize diri al kio korespondas viaj monsendoj.

==========================================================

L'Imprimeur-gérant: GAY André. Imprimerie spéciale de "La Liberpensulo" rue Lambert Dumesnil- HERBLAY -(S. & O.)FRANCE.

1a jaro. Oktobro - Decembro 1955 N° 1



POR RACIO ...

PER ESPERANTO ...

# LA LIBERPENSULO

Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur

Lumigas nian vojon,,,

ĈiuTrimonata Internacia Revueto de Edukado kaj Instruado, eldonata sub la aŭspicio de S.A.T.

Redakcio: G A Y Andreo, Rue Lambert Dumesnil - H E R B L A Y (S.& O.) - FRANCIO -

C.C.P.: PARIS 10.549-49

Abonprezo: 100 francaj frankoj por 10 numeroj

## PERSPEKTIVOJ

Tiu numero aperas pli ol unu jaro post la propagandilo.

Kial tiu prokrasto ? - Ni suferis multajn malfacilaĵojn. La unua estis manko da mono, kaj pro tio ni rezignis la presitan formon. Kelkaj K-doj ankoraŭ ne pagis la ricevitajn ekzemplerojn de la propagandilo (el Jugoslavio, Aŭstralio Brazilio, ktp.) Ankaŭ ni sendis la propagandilon al aliaj, kiuj tion petis, sed kiuj... forgesis sendi monon. Bedaŭrindaj faktoj !

Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj nin helpis ĉu mone, ĉu alie. Pro manko da spaco ni ne povas doni la nomojn. Se iam povos aperi en "La Liberpensulo" aktualecajn informojn, nia celo estas, ke ĝi estu precipe eduka bulteno, permesante al la K-doj fariĝi pli kaj pli konsciaj liberpensuloj.

K-do proponis, ke ni rezignu nian bultenon, kaj enkartigu frakcian paĝon en S-ulo. Tio ne eblas. La nura solvo estas: "Al liberpensula frakcio, liberpensula bulteno". Kiel unua paŝo, ni celas ĝin aperigi 4 foje jare. Kaj, kun la helpo de ĉiuj, "La Liberpensulo" vivos.

Gajulo.

--*****O*****--

## MIA OPINIO

Laŭ la laborista regulo: "Esperanto ne estas Celo, sed Rimedo".

Tiel, kiel la aliaj konsciaj esperantistaj laboristoj mi opinias, ke nia kara majstro Zamenhof, la unua, eraris kredante ke sufiĉus nur, universale uzi iun neŭtralan helpan lingvon por ke la paco regu sur tero. Multaj kredemaj esperantistoj same pensas ankoraŭ, kaj la plimultaj el la konsciaj multe timus ofendi ilin, alvokante ilin al la realeco pri religio, militarismo kaj aliaj malindaj institucioj. Tiu ĝentileco estas tro grave maloportuna por la progreso de sociologio. Efektive, kiamaniere la homoj povos korekti siajn spiritajn difektaĵojn se ili ne havas konscion pri ili per la kritiko libere kaj reciproke kunsentita ?

Estas pruvite, ke ne sufiĉas ke la homoj parolu ĉiuj la saman lingvon por bone interrilati. Estas aliaj gravaj kaŭzoj de malakordo, ol la ne interkompreno pro diverseco de lingvaĵoj.

Estas pruvite, ke la sama uzado de iu nacia lingvo ne malapergas la internajn militojn aŭ revoluciojn per la armiloj.

Kontraŭe al kelkaj malnovaj opinioj, ankaŭ la praktikado de kia ajn religio ne sufiĉas por plibonigi la spiritojn. Efektive ili plej ofte estas la kaŭzo de gravaj malakordoj, fanatikaĵoj, interekspluatado de la homoj, kaj kruelaj murdadoj eĉ inter samlandanoj. La solvo estas alie.

Tamen, iu komuna helplingvo povas faciligi la disvastiĝon de la diversaj pensmanieroj, bonaj aŭ malbonaj, tra la tuta mondo.

La parazitaj homoj komprenas la valoron de tiu rimedo kaj multege uzadas ĝin, prefere la naciajn lingvojn por semi kaj semi senĉese la spiriton de la malbono, ĉu per hipokritaj trompemaj paroladoj kaj ĉiuspecaj perfidaj skribaĵoj. Per libroj, per revuoj, k.c., bele prezentitaj, per belaj ilustraĵoj kaj belaj presaĵoj, per tre modernaj, perfektaj kaj rapidaj presmaŝinoj.

Laŭ la rimedoj.- Vel Ĝenerale, la aro de la plej fidindaj edukistemuloj ne havas tiel

perfektajn presmaŝinojn, kiel la parazitoj, je sia dispono por allogi la legantojn vaste disdoni siajn pensojn. Tamen ekzistas, kaj estas feliĉe, presrimedoj pli mode-taj por la malriĉuloj. Ankaŭ la logika universala lingvo Esperanto estas je ilia dispono por dissendi siajn pensojn tra la landlimoj. Estas la vojo elektita de nia k-do Gay por oferi racian interrilaton al la esperantistaro kaj ni, certe, kore aplaŭdas kaj aplaŭdos al lia iniciativo. Por plibonigi la rezulton, la afero estas komuna inter kelkaj unuaj zorgemaj kunlaborantoj.

Laŭ la oficoj kaj interhelpado.- Sekve al propono de disdonò de oficoj, mia vid--punkto estas: Ke la fondinto de nia gazeto, nia k-do Gay devas daŭre esti la direktoro kaj la redaktoro al kiu ni sendos niajn artikolojn, kiujn li apartigos, korektos aŭ modifos se li juĝas necese por utiligi ilin laŭ sia vidpunkto kaj laŭ iu linio komune ellaborita. La laboro ne mankos por li, ĉar li devos sendi la elektitajn artikolojn al la k-doj aŭtokopistoj loĝantaj en diversaj urboj. Mi esperas ke tiuj lastaj estos pli kaj pli multnombraj por ke nia k-do fine, li men, ne plu bezonos sin okupi pri parto de presado. Post la presado, la aŭtokopistoj devos sendi al li, en Herblay, la necesan kvanton da kopioj, kiujn li devos broŝuri por formi nian gazeton, kiun li sendos al la legontoj, k.c.. Ni koncias pri tiu grava kaj peniga laboro. Ni opinias, ke por la sukceso de tiu afero, ĉiuj amikoj devas helpi laŭ siaj poveblecoj.

Pli rimarkinda estos tiu entrepreno ĉar ĝi baldaŭ estos pli kaj pli je la stadio de internacia kunlaborado. Jam la K-do Weichmann en Germanio sendube presos almenaŭ unu folion. Mi kredas ke tiu folio povus esti aŭ fariĝi aŭtonoma, redaktita laŭ la principo ĉi supre priskribita, kun la germana K-do kies redaktoro. Estus la "Germana Folio." Laŭ la sama principo, ĉu ni ne povus havi iun folion, almenaŭ de la plej proksimaj landoj: Belgan folion, Anglan, Italan, Svedan, Ktp.? K-do Gay estus la broŝuristo, la konsilanto aŭ ĉefredaktoro, aŭ prefere la Direktoro. Kian belan gazeton ni fine povus realigi per tiu admirinda internacia kunhelpado !

He! K-doj alilandaj kaj francaj, kiuj disponas iun skribmaŝinon, multobligilon, aŭ iajn presileton aŭ alian aŭtokopistan aparaton, bonvolu vin kunigi al ni por nin helpi kaj triumfigi kun ni la veron, la racion.

Via laboro konsistos el preskopiado de almenaŭ unu folio, tio estas du paĝojn formato 21×27 (la jena formato.)

Ne estos grava kaj peniga laboro por ĉiu, sed grava komuna realigado je la profito de ĉiuj.

Se estas kelkaj k-doj kiuj havas nur la volon kaj la kuraĝon por tio, ili bonvolu peti la teknikan parton al la K-do B A R I T E A U D - ĉe La Verda Stelo - G R A S S E (A.M.) Francio.

* * *

Nuntempe ni estus feliĉaj trovi iun K-don sufiĉe lerta, amatora gravuristo sur linoleumo, ligno aŭ metaloj, por pli bone desegni kaj gravuri la ĉi-supran embleman desegnon de la titolo de nia revueto, por tipografie presi ĝin.

Se kelkaj K-doj volas agi sen pli da prokrasto, notu ke:

1°- En tiu desegno estas du ĉefaj difektoj: a) La mano faras tro akra angulo kun la brako. b) La fera ringo ne aperigas la pezon de la rompita kateno per taŭga klino.

2°- La amplekso de la gravuro ne devas superi 100 m/m, por la alteco, de la pinto de la flamo ĝis la pinta fundo de la torĉo kaj de la rompita kateno; ×50 m/m de larĝeco. Se vi povas fari ĝin pli eta kaj sufiĉe neta, faru ĝin. Ekzemple: 80×40

Bonvolu sendi vian laboron finitan al Bariteaud en Grasse kiu prezentos al la legantaro kiu juĝos. La plej lertaj gravuristoj estos rekompencitaj. Mi proponas.

Bariteaud.

-----==============-----

# NACIISMO KAJ RELIGIO

Speco de religio de malpli klara, sed ne malpli danĝera karaktero estas la naciismo, ĉar en ĝi estas rajtiga inklino de memkonservado kaj memdefendo de la homkomuneco per troigo de ĉi-tiu ĝusta principo, je la fino kondukataj en tiaj neĝustaj vojoj, ke ili ne gvidas al libereco, kaj sekureco komforto de la tuto, sed kontraŭe al subpremo, rabado, pereigo de aliaj nacioj tute simile kiel ni tion vidas ĉe la religio. La nova idolo "nacio" senkulpigas ĉiujn krudecojn, kiuj ordine neniu honesta homo permesus al si. Provincrabo, rabemo, promesrompo, ŝtelo, murdo estas permesataj, se oni kovras ĝin per mantelo.

Kio per ĉiuj homaj leĝoj estas puninda kaj fia, tio estas virto, tuj kiam ĝi favoras imagitan aŭ pretekstan avantaĝon de la nacio.

Suspekta estas jam la cirkonstanco, ke la religio kaj la naciismo tiel bone sin toleras reciproke kaj kutime faras komunan agadon. La pastro benas la standardojn kaj pafilegojn, kun kiuj tute bonkoraj, fidemaj homoj eliros por murdi samaj senkulpajn naivajn infanojn de la aliaj nacioj. En preĝejoj oni legas mesojn por petigi la venkon de la propraj armiloj kaj la plej radikalan detruon de la alia nacio.

Ju pli granda la nombro da kripligitaj,sub nedireblaj turmentoj murditaj kontraŭuloj estas, des pli gaje sonoras la sonoriloj, des pli feliĉe leviĝas la dankpreĝoj al Dio. En la eltrovo de bele sonantaj vortoj kaj frazoj, per kiuj oni povis beligi la friponaĵon de la propra agadmaniero, la naciismo estas tiel lerta, kiel la religio. Anstataŭ forigi la eksplodaĵojn,anstataŭ ebligi al ĉiuj trankvilan vivon, anstataŭ ekstermi plene la malbonajn instinktojn, kiuj kondukas al la milito, la naciismo serĉas ĉiam novajn pretekstojn por pligrandigi la propran potencon je la kostoj de la aliaj, malfaciligi la vivkondiĉojn de la aliaj per subpremo, por havigi novajn avantaĝojn.

La finrezultato estas :

1.-Ĉar neniu religio entenas la verecon pri la kunteneco de la aĵoj, kiuj estas tiel gravaj por la bonfarto de la homaro, ĉar jam la elirpunkto, Dio kaj animo estas malĝustaj,

2.-Ĉar neniu religio estas kapabla, akceli spirite, morale kaj materie la homon,

3.-Ĉar la religioj kaŭzis al la homaro tiom da pozitivaj doloroj kaj vualis ilian malbonan, antisocian karakteron,

El ĉi-tiuj kaŭzoj la religioj perdis ilian ekzistorajton kaj devas esti kondamnataj en ĉiu formo. (El la libro "Ĉu Dio vivas ankoraŭ", de Dro. E. Blum, Esperantigis E. Keiser el Svisio).

---

KELKAJ MINUTOJ KUN MAJSTRO...

... Laŭ tre ĝenerala vidpunkto, eblas klasifiki la filosofajn sistemojn laŭ du distingaj kategorioj: La kreadistaj sistemoj, kaj la evoluciistaj sistemoj.

Ne estas hazarde, ke la pensuloj sin enklasigas en unu aŭ alia kategorio. La pensuloj je mistika emo estas kreadistoj; la pensuloj je scienca emo estas evoluciistoj.

La kreadista konceptado reprezentas la unuan provon de la homo,doni racian klarigon de la universo; estas facile komprenebla, ke en tiu unua provo la homo ne povis tute ellasiĝi el la plena estriĝo de la fantazio.

Sed la kreadismo ne estas nur la doktrino de la praaj pensuloj; ĝi estas ankaŭ la doktrino de la mistikemaj pensuloj el ĉiuj epokoj.

Mistikema pensulo estas supraĵema pensulo; li emas kredi ke tio, kio estas nune, ĉiam estis tiel.

En la ĝenerala evolucio de la universala substanco estas nepre individuaj evolucioj,kiuj formas tiom da distingaj grupoj; tiuj grupoj estas distingaj sed ili ne estas dispartigitaj, ĉar ili ĉiuj havas la saman subtavolon.La mistikemuloj konsideras tiujn grupojn, kiel tute kontraŭaj unuj al la alia kaj sencedaj, pro ilia naturo mem.

Jen ekzemple ses grupoj distingaj kaj diferencigitaj duope: la neorganika mondo kaj la organizita mondo; la anima mondo kaj la korpa mondo; la objekta mondo kaj la pensa mondo; ni scias ke ĉiuj, tiuj grupoj estas konsistigataj per substanco pli aŭ malpli malsimpla, pli aŭ malpli evoluciita.

Por la mistikemulo, la neorganika mondo estas inerta kaj la organizita mondo estas viva; la anima mondo estas nemateria kaj la korpa mondo estas materia; la objekta mondo estas vasta kaj la pensa mondo estas nevasta. Ĉiuj, tiuj grupoj estis kreitaj aparte; la Universo mem, en ĝia tuto, estas arta verko. La kreanta artisto nomiĝas Dio.

Se vi demandas al la mistikemulo: kie troviĝas tiu artisto, kaj kiel li Lin vidas, li respondos al vi ke Li estas supernatura estaĵo kaj ke ni, kiel naturaj estaĵoj, ne povas Lin koncepti !

Tio estas tre oportuna, kaj cetere la mistikemulo neniam sin embarasas. Antaŭ eksterordinara fakto, la sciencemulo per ĉiuj fortoj

klopodos serĉi la kaŭzon, por prezenti racian klarigon; sed la mistikemulo ne tiom laciĝos; li rigardos kompate la esploriston ĉar li ja scias, li, ke eksterordinara fakto estas miraklo, t.e. la efekto de dia enmiksiĝo !

La kreadismo estas la nescia doktrino; sed ĝi estas ankaŭ la netolerema doktrino, kaj pro tiu motivo ĝi estas malaminda !

Kiam oni studas la historion de la filozofio, ne sen malĝojo oni konstatas, ke la trudpenso de kreinta Dio laŭvorte malvirtigis la tutan filozofion de la mezepoko, kaj eĉ tiun de la nunaj tempoj. Oni estas surprizita pro la persistemo de tiu malbonfara fantomo ĉe verkistoj, kiujn oni kredis kapablaj sin liberigi je ĝi.

Pripensante oni komprenas, ke tiuj verkistoj ne estis liberaj, ĉar la fisekto de la inkviziciistoj klinigis ilian frunton kaj premis ilian penson, per la abomeninda minaco de la punbrulejo !

o o o

La evoluciismo estas konceptado de la praa filozofio. Tiu konceptado montras al ni la Universon, kiel farita nur el substanco, kaj la substanco kiel konsistigata el atomoj.

La universa ordo ne estas hazarda efekto; ĝi rezultas necese el la fundamentaj proprecoj de la atoma substanco: la sopiro efektivigi kiel celo, kaj la movado kiel rimedo.

La pensuloj de la 19a jarcento ekkaptis la praan teorion por ĝin kompletigi. La praŭlo montris, ke la Universo estas farita el substanco movante, la modernaj pensuloj aldonis: La substanco evolucias en ordo de kreskanta malsimpleco, kaj al la senco de la nedifinita progreso.

o o o

Estas lasta demando :

Ĉu la Evolucia doktrino tia, kia ni ĝin elmontris estas ja la doktrino de la vero ?

La respondo al tiu demando estas en la sukceso mem de la elpruvado, la elpruvado estante la administro de la pruvo.

La pensoj elmontritaj en tiu verko konsistigas kompletan sistemon, kies partoj akordiĝas perfekte inter si; ĉar estas la ekstera mondo, kiu liveras al ni la substancon de tiuj pensoj, ni rajtas konkludi ke la sistemo de la pensoj korespondas perfekte al la sistemo de la Universo.

La Evolucia Doktrino tia, kia ni ĝin elmontris, estas do la esprimo mem de la vero, ĝi ja povas esti rektifita en la detaloj, sed en la ĉefaj trajtoj ĝi ne ŝanĝos. Kaj ni estas konvinkitaj ke en tre proksima estonto, ĝi kuntrenos la aliĝon de ĉiuj inteligentoj, la universa kunsento.

Filipo CELERIER, en "La Evolucia Doktrino"
(paĝoj 240 ĝis 243). Esperantigis Gajulo.

---

| BONVOLU ELEKTI... | BONA KONSILO ! |
|---|---|
| Aglo flugas kun fiero | Preĝejon, trinkejon evitu |
| Sola en sunbril'aero. | Pro densa nebul'atmosfer' ! |
| Vice lamas ansereto | Naturon, sunbrilon vizitu, |
| En ansera societo. | Birdkanton en freŝa aer' ! |
| Porko ridas nur ĉe poto | Ĉar tie vortbruo silentas, |
| Emas ruli sin en koto. | Foriĝas de homo la tim', |
| Diru, kiu el la tri | Interne feliĉon li sentas |
| Estu ideal' por vi !?! | Pro sano de korpo, anim' ! |

(Originalaj poemoj de Josef BURGER el Sarlando).

l'Imprimeur-Gérant: GAY André. Imprimerie spéciale de "La Liberpensulo"
rue Lambert Dumesnil- HERBLAY -(S.&O.) FRANCE.

Dum ĉiu tempo kaj en ĉiuj landoj, la pastro estis la malamiko de LIBERECO :
(Tomaso Jefferson, Prezidanto de Uzono 1743-1826).

La Kongreso de la Mondunuiĝo de Liberpensuloj okazos en LUKSEMBURGO, de la 2a ĝis la 6a de septembro 1954. Skribu al naciaj asocioj, petante uzon de Esperanto ! !

MALVERECO DE LA MIRAKLOJ ! Neniu miraklo okazis antaŭ kunveno de homoj kapablaj konstati la miraklan econ de fakto. Nek la popolaj personoj, nek la mondumo havas kompetenton por tio. Tie necesas grandaj antaŭzorgoj kaj longa kutimo de la sciencaj esploradoj.

Ernest RENAN.

## ANKAŬAĴOJ

Mistikaj aperajoj favoris en Lurdo iun nekleran kampulinon, nome Bernardino Subirus. La epoko estis ja favora, kaj la doctrino de « Senmakula gravediĝo », tuj dogmiĝonta, estis aktualaĵo.

La viziulino oni enkarcerigis, ĝis sia morto, en monaĥinejon malproksiman de ŝia vilaĝo.

Mistikaj aperajoj favoris en Fatimo tri junajn neklerajn geknabojn. La epoko estis favora. De tempo al tempo la Mariokulto bezonas tiajn materiajn firmigojn. Plie nia epoko de turismo rimarkis, ke pilgrimo al Pirineoj tute kongruas kun pilgrimo al Portugalio : sekve la aŭtobusoj ĝemeliĝas Lurdon kaj Fatimon, kio amuzas la inicintojn, kiuj scias, ke de la komenco la dua estis nur kopio de la unua.

La solan postvivinton de la viziuloj, nome Lucio dos Santos, oni enkarcerigis en monaĥinejon malproksiman de ŝia vilaĝo, kie ŝajne ŝi ankoraŭ vivas.

Probable alvenas la tempo, kiam la serio bezonas novan « enkarniĝon » : Lurdo 1858, Fatimo 1917, ...

Mi konsilas al ontaj viziulinoj, kiuj ne havus emon al monaĥineco, pliprefere rezigni la viziojn. Ĉar memkompreneble, por ŝirmi la veron, kaj firmigi la sanktan historion, oni enkarcerigos la favoriton, ĝis ŝia morto, en foran monaĥinejon.

Cetere mia konsilo restos vana, ĉar pliprefere kandidato al la favoro de mistikaj vizioj ne scipovu legi.

***

Ĉiuj religioj estas antropomorfismaj, t.e. ne povas imagi siajn diojn sub alia formo ol homa formo.

Eĉ Zamenhof, kun sia alta idealo pri neŭtrale homa religio, restis teisto, kaj ĉiam skribis « Li » parolante pri Dio.

Logike, Dio devus esti « ĝi », kun aŭ sen grandlitero.

Li, tio estas Dio kun granda barbo, ...barbo, kiun la nekredulo nereteneble ekdeziras petole tiri.

***

« La lernejo, se ĝi ne estas templo, iĝas bestejo », tiel skribis papo Ratti, nomita Pio XIa, en enikliko pri edukado de la junularo (31-12-1929). Kaj li havis la makiavelan lertecon, citi tiun frazon el verko de laikulo : sed la tuta kunteksto montras, ke li tute alproprigis al si tiun opinion.

Ni memoru la konstantan pretendon de Eklezio, monopoligi la instruadon.

An Kaŭ.

*Le Gérant* : André GAY. Langres, Imp. Moderne.

# LA LIBERPENSULO

Por Racio ... ★ Per Esperanto ...

Stadt Dortmund
Fritz-Hüser-Institut
für deutsche u. ausländ.
Arbeiterliteratur

## Bulteno de Liberpensula Frakcio de S.A.T.

No 1 . Redakcio : GAY André, rue Lambert-Dumesnil HERBLAY (S.-et-O.) Francio - C. C. P. Paris 10549-49 Jaro 1954

## NASKIĜO !

Nia Frakcio estas dujara ! Ĝis naskiĝis post mia alvoko en Sennaciulo de décembro 1952, kaj de nun estas bona kerno da frakcianoj en sekvantaj landoj : Francio, Germanio, Sarlando kaj Svisio. En Britio kaj en Nederlando, la kelkaj frakcianoj... dormetas.

Nia tasko estas grandega, ĉar ni celas emigi al la kamaradoj nenion kredi sed ĉion pripensi. Ni deziras kontraŭbatali la dogmojn, *ĉiujn dogmojn*.

La devo de ĉiu konscia ateisto, raciisto, anogstikisto, k.s., estas nin helpi en tia gravega tasko.

Hodiaŭ aperas la unua numero de nia Bulteno, dank'al la monhelpo de kelkaj kamaradoj. Ni ilin dankas.

Ĉu ĝi aperos ofte, regule ? Tio dependos de la sukceso de tiu-ĉi unua naskito. Vi povas nin helpi aĉetante multkvante nian bultenon, ĝin disdonante kaj ĝin diskonigante.

Ni pretas fari nian tutan taskon, faru la vian !

Gajulo.

## RELIGIOJ KAJ STATISTIKO
## « UNIVERSALA DIO REVELACIUS UNIVERSALAN VERON »

Tion skribis, en sia fama testamento, pri kiu jam atentigis Voltero, paroĥestro Meslier (Melje'), mortinta 1753.

Lian tekston oni ankoraŭ nun povas utile legi :

« Tiel malsame sin konigis Dio en la diversaj landoj de nia terglobo, ke pri religio la homoj sin reciproke rigardas kun malamaj kaj malsataj okuloj. La anoj de la diferencaj sektoj sin opinias reciproke tre ridindaj kaj tre malsaĝaj. La misteroj plej respektataj en iu religio estas mokindaĵoj en alia. Car Dio penis sin malkaŝi al la homoj, almenaŭ li devus paroli al ĉiuj la saman lingvon ; kaj maltrudi al ilia mallerta menso tiun embarason : serĉi, kiu povas esti la religio vere elveninta de li, kiu estas la kulto vere agrabla al liaj okuloj.

« Universala Dio devus revelacii universalan religion. Pro kiu fatalo troviĝas do tiom da malsamaj religioj sur la tero ? Kiu estas la vera inter la multo de tiuj kiuj pretendas esti tia, ĉiu ekskluzivante ĉiujn aliajn ? Ja konvenas kredi, ke neniu ĝuas tian superecon ; divido kaj disputo inter la opinioj estas la nedubindaj signoj pri necerteco kaj malklereco de la principoj el kiuj oni deduktas. (§ 114) »

« Por saĝa homo, nenio aperas pli ridinda ol la opinio formata, unu pri

Lucifero... Kiam li estis ankoraŭ Jehovo, Saboat aŭ Elohim, kiel vi preferas, li devis puni la unuan homon, puni liajn idojn per diluvo... Li sendis sian propran filon al la morto, pro stranga interŝanĝo ; li sendis apostolojn, li sendis miraklistojn, li sendis Konstantinon kaj multajn reĝojn kiuj konvertis perforte aŭ persvade siajn regatojn, li sendis misiistojn, li sendis la Sanktan Inkvizicion, li sendis la Jesuitojn « por Sia plej granda gloro », li sendis la Virgulinon al ĉiuj lokoj kie oni atendis ŝin, al Lurdo, al Fatimo, li eĉ dancigis la sunon en la ĉielo unue por la Fatimaj viziuloj, due en speciala reeldono por la nuna papo en la Vatikanaj ĝardenoj, ĉio vane, vane, vane...

Senfine bona Dio toleras, ke grandega plimulto de liaj homaj kreitoj estas poreterne damnataj ; senlime potenca Dio vane penas, por plibonigi la statistikon ! Neniu kontraŭreligia argumento ŝajnas al mi pli drasta.

An Kaŭ.

## « ESPERANTO KAJ SEKULARISMO »

de P. Victor Morris,

Sekretario, brita Nacia Sekulara Societo

En la daŭrado de tridekjara membreco de la societo de kiu mi nun estas la sekretario, mi estas konstatinta, ke pluraj entuziasmaj Esperantistoj ĉiam troviĝas inter niaj vicoj. Eksciinte lastatempe ankaŭ per artikolo en nia gazeto « The Freethinker » (La Liberpensulo), ke kvar milionoj da Esperantistoj vivas en la mondo hodiaŭ, mi povas eldiri, ke ilia proportio devas esti almenaŭ sesoble pli granda, ol en plej multaj el alispecaj aroj de la mondlaĝantaro.

Laŭ kiu cifero ŝajnas, ke nia movado estas forte simpatiema al la celo aldoni mondlingvon al jam ekzistantaj nacilingvoj, por faciligi la plej plenan komprenon inter ĉiuj popoloj. Tamen mi ne scias, ke iu gvidanto en nia movado iam estis praktikanta Esperantisto, nek mi mem povas pretendi esti tiu. Mi petas al la legantoj konstati, ke tio-ĉi okazas pro trookupado pri aliaj taskoj ne malpli gravaj.

Se tiuj plej agemaj en la Sekularista movado, kiu batalas savi la homan menson kaj homan vivon kontraŭ la influo de superstiĉo, malpensado, maltoleremo kaj reakcio, ne povas trovi la tempon lerni Esperanton nun, ili tamen komprenas, ke la universala enkonduko de Esperanto kiel instruata temo en lernejojn kaj universitatojn estus unu el la plej grandaj paŝoj antaŭen iam ajn alprenota en la marŝado de l'homaro al civilizado, kiu meritus la nomon.

tradukis Valrando.

*Noto* : La brita Nacia Sekulara Societo kunigas liberpensulojn el iuj landoj en la Brita Komunaro. Do membroj ankaŭ troviĝas ekster Britio mem, ekzemple en Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando, k.t.p.

*Noto de la Redakcio* : Ni pensas, ke la Kdo P. Victor Morris eraras, tiam li diras, ke multaj en la Sekulara Movado ne lernas Esperanton pro manko da tempo. Pli ĝuste, estas tial, ke ili ne vidis ĝis nun la gravecon de la problemo. La universala enkonduko de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj okazos nur, kiam sufiĉa kerno da Esperantistoj sukcesos tion trudi.



### ĈU POSTE AŬ JAM NUN ?

En landoj regataj de Romo
Mallumas en homo kaj domo.
Kaj same ĉe la reformitoj
Ne brilas tre lumaj spiritoj.
Eĉ kie aktivas kristsekto :
Nur kredo kaj ne intelekto.
Ĉar ili proklamas per vorto
Feliĉon, sed nur post la morto.
Profitas el tiu ĉi stato
Per helpo de leĝdona ŝtato
Nur bonza supera tavolo
Je kostoj de simpla popolo.
Sed ni, — ni jam volas sur tero
Konstrui en paco, libero
En frata komuno per faro
Bonfarton por tuta homaro !

(Originale de Kastelano)

### LA SENMORTAJ DIOJ

Senescepte ĉiuj Dioj
Venis nur el iluzioj
Kaj ĝis nun ne malaperis,
Ĉar per ili ja prosperis
Ligo kun negoc-afero
Sub vualo de « Mistero » !
Dioj sen perfort', sen or'
Jam tre baldaŭ estus for !

### KREDA FORTO

Ĉar kutimo tia estis,
Kelka kiel suĉinfano
Brave iĝis jam kristano
Kaj fidele ambaŭ restis
Sen ŝanĝiĝo ĝis la morto
Dank' al firmkredema forto !

(Originale de Kastelano)

Se vi deziras nin helpi en nia batalo kontraŭ la Eklezioj, fariĝu Liberpensula Frakciano !

## DEVENO DE LA HOMO

Se Dio ne faris la Mondon, evidentas, ke li ankaŭ ne faris la homon.

Ĉar la homo estas nur sensignifa parteto de la mondo.

Ni estas nek superaj, nek eksteraj al la Naturo ; ni partoprenas en ĝi, ĝis nin intermiksi kun ĝi, obei al la samaj leĝoj, kaj esti kuntrenitaj per identa movado.

Mi min sentas tiom malnova, kiom la universo ; tiom ĉiama, kiom ĝi ! La molekuloj, kies mi estas konsistigita, estas nutrataj, provizataj per nememorebla forto. La fluo, kiu trakuras miajn vejnojn, vibrigas miajn fingrojn aŭ febrigas mian cerbon, estas la sama, ol tiu, kiu forportas la gigantajn mondojn en la spacego, aŭ kiu kreskigas la herberon sub miaj piedoj...

Profesoro Karel (Carrel) faris vere kuriozan eltrovon, kiam li elpruvis, estas proksimume dudek jaroj, ke eblis kulturi homajn histojn EKSTERE DE LA ORGANISMO.

Fragmento el nia korpo (haŭto, koro, muskolo, k.t.p.) transplantita en medio speciale preparita kaj plurfoje renovigita, povas resti vivanta kaj daŭrigi kreski dum pli, ol sesdek tagoj. Ne estas pridubeble, ke oni sukcesos pluigi en vivo, en konstanta maniero, histojn devenantajn el la korpo de la bestoj — aŭ de la homo.

Jakobo Loeb, en alia kampo, meritas nian simpatian admiron.

Li efektivigis la ĥemian fruktigon.

Prenante virgajn ovojn de ekinoj, li ilin fruktigas, ne per la faro de la Sankta Spirito, sed ilin kontaktigante kun grasa acido.

La vivo ĉesas esti neklarigebla mirindaĵo, ĉar la klerulo, en lia eksperimentejo, povas sin substitui, kvazaŭe, al tiu fama viva instinkto, kiun ni fine atingis nek difini, nek kompreni !

Mia eminenta amiko, Profesoro Erera (Herrera) el Meksiko, same efektivigis laborojn, kiuj meritus esti pli bone konataj.

Li fine atingis, efektive, fabriki VIVAJN ĈELETOJN.

Per formolo, plumba acetato, mi ne scias kion ankoraŭ (la ekzakta formulo de la mikso estas tre simpla, kaj povas esti efektivigata de iu ajn eksperimentisto), li sukcesas krei malgrandajn gelatenajn masojn, kiuj moviĝas, sin moviĝadas, kaj iras ĝis sin reprodukti, sin dupartigante.

Simplaj skizoj, ankoraŭ neperfektaj, konsentite ? Sed, ĉu tiu larva bildo de la vivo, atingita eksperimente, artefarite, ne venas konfuzegi ĉiujn niajn malnovajn konceptadojn ?

***

Fakte, ekzistas tri hipotezoj pri la deveno de la homo.

La unua, kiu eĉ ne meritas esti kontraŭargumentata, konsistas diri, ke Dio kreis al Sinjoro Adamo kaj al Sinjorino Evo, ilin fabrikante propramane — kaj tute (kaj perfektaj ! !).

La dua hipotezo, preskaŭ forlasita hodiaŭ, nomiĝas la spontanea nasko. Ĝi deklaras, ke la vivo povis ekvidiĝi spontanee sub elementa formo, sur la surfaco de la terglobo, en iuj kondiĉoj de temperaturo kaj medio, kiujn ne eblas al ni restarigi.

Fine, tria hipotezo, la plej saĝa el ĉiuj, supozas ke la elementa ĉefa ĉelo, anstataŭe spontanee subite spruĉi el la materio, devenus el aliaj planedoj, kaj estus estinta transportita sur la tero pere de iu meteorŝtono. El tiuj organismoj (verŝajne malgrandegaj) estus elirintaj per iom post ioma evoluo, kiu necesigis milionojn da jaroj, la bestaj formoj nune ekzistantaj.

Mi diras, ke tiu hipotezo estas la plej saĝa. Sed, realece, ĝi ne foriĝas nepre la duan hipotezon, tiu de spontanea nasko. Ja necesis, ke la unua viva ĉeleto fariĝu meze en « neorganika » materio ! Ke tiu spontanea nasko estu okazinta sur nia tero aŭ (pli verŝajne) sur alia globuso, eble kuŝita je miliardoj de mejloj al nia kara malgranda planedo, tio tute ne diferencas...

Sed, kial ni konsiderus tiom grava tiun trairon de la neorganiko al la organiko ?

Ni estas liberigitaj je la superstiĉo de la vivanto kaj de la inerto.

La unua viva ĉeleto ne estas, laŭ mia opinio, la vera elirpunkto.

La lumo, la transviolaj radioj, la akvo de la oceanoj, la ĉielaj polvoj, la elektraj radiadoj, ĉio tio estas viva, ĉio tio estas riĉa de estonteco...

Ne estas limfiksado inter la fenomenoj de la naturo: Ĉu ili aspektas al ni simplaj aŭ malsimplaj, ĉu ili estas elementaj kaj maldelikataj aŭ nobelaj kaj altaj, ili estas el la sama esenco. Sub mil malsamaj aspektoj, estas ĉiam la universa, senfina, nekreita vivo, kiu sin aperigas.

Andreo Lorulot, en « Kial mi estas Ateisto ». (Tradukis Gajulo).

## KIEN IRAS LA MONDO ?

Estas nur unu Vivo en la tuta Universo ;
Kaj vi estas tiu Vivo.

Krishnamurti.

Nenie ! Kien vi volus, ke ĝi iru ?

Ĉar la Mondo estas senlima, kiel oni povus aldoni aŭ forpreni al ĝi ion ? La demando estas do infane bagatela.

« Post centmiliardoj da jarcentoj, skribis Maeterlinck, la situacio estos la sama, kia hodiaŭ ; la sama kia ĝi estis, estas centmiliardoj da jarcentoj ; la sama, kia ĝi estis de iu komenco, kiu cetere ne ekzistas ; la sama, kia ĝi estos ĝis la fino, kiu ne ekzistos pli. »



Kaj eĉ se estus iu « Dio », li nenion povus ŝanĝi al tio...

La Mondo ekzistas kaj ekzistos. Ĝi estis, estas kaj estos.

Tio ne signifas, ke la mondo estas fiksa kaj senmovigita. Ni scias, kontraŭe, ke ĝi estas malkvietigita de senĉesaj repuŝiĝoj, ĉar ĝi estas viva. Kaj estas pro tio, ke ĉio agitiĝas, ke ĉio ŝanĝiĝas kaj sin tute aliigas.

Maeterlinck aldonas :

« En la Universo ĉio estas necese entenita, kaj nenio povas, en la tempo aŭ en la spaco, troviĝi ekster de ĝiaj limoj, ĉar ne povas esti limoj. »

Ne estas loko por Dio ; nenie !

***

Oni konfesos, ke estas ja facile respondi al la « esencaj » demandoj, kiujn faris la sekretega Bergson.

DE KIE NI VENAS ? De Dio, asertas la kredantoj. De la Universo, ni diras !

KIO NI ESTAS ? La verko de Dio ? Tute ne : parto el la Mondo evoluciante !

KIEN NI IRAS ? Al la juĝo de Dio ? Kia burleskaĵo ! Ni reiras de kie ni venis : al la ĉiama iroreirado de la universa vivo.

Komparu la du kategoriojn da respondoj kaj diru al mi, malkaŝe, kiu flanke troviĝas la logiko kaj la klareco ?

Andreo Lorulot, en « Kial mi estas Ateisto ». (Esperantigis Gajulo).

---

Gepatroj ! Viaj infanoj devas iam fariĝi Homoj. Por ke ili taksu sane, ne lasu la pastrojn el iu ajn religio ilin timigi, ilin stultigi. NE SENDU VIAJN GEFILOJN AL LA INFANSTELISTOJ ! !

---

**LA LIBERPENSULO** estas havebla ĉe la redakcio kaj ĉe la frakciperantoj kontraŭ :

| | | |
|---|---|---|
| 1 ekzemplero ..... | 30 francaj fr. | |
| 10 » | 250 | » |
| 100 » | 2000 | » |

aŭ ekvivalento en respondkuponoj. Mendu multajn, por ebligi la naskiĝon de la venontaj numeroj.

### FREMDA MEDIO

Afabla pastro de vilaĝo
Demandis min : « En via aĝo
Akcepti devus vi prudenton
Kaj petit tuj la sakramenton !
Ĉu vi ne timas la inferon ? »
Mi diris : « Ne, Ĉi atmosferon
Mi konas, ĉar por viv-ekzisto
Vivlonge estis karbministo !
Tro multe spertis mi suferon,
Nun timas mi ne plu inferon !
Sed tion pastro ne komprenas,
En karbminejon ne li venas ! »

(Josef Burger).

### BONA KONSILO

Preĝejon, drinkejon evitu
Pro densa nebul-atmosfer' !
Naturon, sunbrilon vizitu,
Birdkanton en freŝa aer' !
Ĉar kie vortbruo silentas,
Foriĝas de homo la tim',
Interne feliĉon li sentas
Pro sano de korpo, anim' !

(Josef Burger).

### DIFERENCO !

Preferu eduki fremdulojn !
Ne risku komenci ĉe vi,
Vi devus vin ŝanĝi hodiaŭ,
Sed mankas por ĝi energi' !
Pro tio eĉ malgraŭ bonvol'
Nun ĉie nur regas parol' !

(Originale de Josef Burger).